Asocio por la Protekto
kontraŭ la Jonigantaj Radiadoj
(A.P.J.R.)

# alvokoj al la homa konscienco


1. TUTE ANTINUKLEAJ ..... 9
2. KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO ..... 13
3. ALVOKO AL LA HOMOJ ..... 25
4. REGULOJ DE DEONTOLOGIO PRI LABORO ..... 30
5. INDIVIDUAJ LIBEROJ ..... 35
6. KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO ..... 41



Cercle espérantiste de l'Agenais
Laŭte! * F 47340 Laroque Timbaut
1984 * 5 FF

SAT-BROŜURSERVO

# APROBO

* = Forstreku la rifuzitajn menciojn

A. LISTO DE LA ALVOKOJ

1) Alvoko por Grupo "TUTE ANTINUKLEAJ",
2) Alvoko por Grupo "KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO",
3) "ALVOKO AL HOMOJ"
4) Alvoko por Grupo "DEONTOLOGIO DE LABORO",
5) Alvoko por Asocio "INDIVIDUAJ LIBEROJ",
6) Alvoko por Grupo "KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO".

B. Mi, subskribinte, PERSONO aŭ ASOCIO, aprobas la alvoko(j)n:
1* - 2* - 3* - 4* - 5* - 6*

C. Mi aliĝas al asocio(j) fondita(j) ĉiutage kiel libera(j) asocio(j) :
1* - 2* - 3* - 4* - 5* - 6*

Koncerne la alvokon 3an, mi precizigas : Asocio supernacia* aŭ nacia* de kuracistoj kaj de asocioj de kuracistoj* ; aŭ : Asocio de kuracistoj kaj de anoj de kuracaj profesioj, supernacia* aŭ nacia* kaj de ties asocioj* ; - aŭ : Asocio supernacia* aŭ nacia* de estontaj eblaj viktimoj kaj de ties asocioj*.

aŭ D. Mi atendas por aliĝi la fondon kiel deklarita(j) asocio(j) de la asocio(j) :
1* - 2* - 3* - 4* - 5* - 6*

E. Tamen mi petas vin sendi al mi la nova(j)n ĝisdatigo(j)n de la alvoko(j) :
1* - 2* - 3* - 4* - 5* - 6*

F. Sur kroma folio mi adresas al vi miajn rimarkojn
(po 1 folio por ĉiu alvoko, mi petas).

G. Bonvole sendu al mi ... ekzemplerojn de la alvoko(j) :
1* - 2* - 3* - 4* - 5* - 6*

H. Mi sendas donon de ..........**por diskonigo de la alvoko(j)** :
1* - 2* - 3* - 4* - 5* - 6*

Antaŭnomo kaj nomo : La

Profesio kaj titoloj : Subskribo :

Adreso de la PERSONO :

- aŭ : stampo de la

ASOCIO :

Resendi al la sendinto, se ne al :
A.P.J.R., 80 rue des Noyers, Crisenoy, F 77390 Verneuil l'Etang (Francio)

# SES ALVOKOJ AL LA HOMA KONSCIENCO

ANTAŬPAROLO, de Johano PINJERO.

RIMARKOJ RILATAJ AL ARO DE "DEONTOLOGIAJ KODOJ", de Genoveva KOSTE.

1. TUTE ANTINUKLEAJ : Universala grupo de personoj kaj asocioj senperfortaj fundamente, tute antinukleaj. En la 84.02.01, 98 personoj kaj 61 asocioj aprobis tiun alvokon, kies ideo estis diskonigita en la 27a de oktobro 1980.

2. KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO: Universala grupo de personoj kaj asocioj aktivantaj por starigi universalan kodon de scienca deontologio, supernaciajn servojn pri sciencaj rekomendoj kaj decidoj, kaj universalan kortumon. FUNDAMENTA TEKSTO pri tiu kodo. En la 84.02.01, 97 personoj kaj 44 asocioj aprobis tiun alvokon, kies ideo estis diskonigita en la 18a de decembro 1980.

3. ALVOKO AL LA HOMOJ por protekto de la homoj minacataj per morto aŭ malsanoj imputeblaj al nuklea milito aŭ civila nuklea katastrofo. En la 84.02.01, 16 kuracistoj, 2 anoj de kuracaj profesioj, 34 estontaj eblaj viktimoj, 1 asocio de kuracistoj, 1 asocio de kuracistoj kaj de anoj de kuracaj profesioj, kaj 10 asocioj de estontaj eblaj viktimoj aprobis tiun alvokon, diskonigitan de Kuracisto Roberto VIALLETEL kaj reprenitan de A.P.J.R.* en la 30a de aŭgusto 1982.

4. REGULOJ DE DEONTOLOGIO PRI LABORO : Universala grupo de personoj : laboristoj kaj ne-laboristoj, kaj de asocioj, kiuj aktivas por starigi deontologion pri laboro. PROJEKTO PRI REGULOJ DE DEONTOLOGIO PRI LABORO. En la 84.02.01, 32 personoj kaj 15 asocioj aprobis tiun alvokon, kies ideo estis diskonigita en la 22a de novembro 1982.

5. INDIVIDUAJ LIBEROJ : Projekto de universala asocio por la antaŭenigo de la individuaj liberoj. En la 84.02.01, 11 personoj aprobis la skizon pri tiu projekto, kies ideo estis diskonigita en la 24a de decembro 1982.

6. KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO : Universala grupo de personoj kaj asocioj aktivantaj por starigi kodon de komunika deontologio. En la 84.02.01, 5 personoj kaj 2 asocioj aprobis la ideon pri tiu projekto de kodo, diskonigita en la 19a de septembro de 1983.

* Asocio por la Protekto kontraŭ la Jonigantaj Radiadoj.

# ANTAŬPAROLO

La ses sekvontaj alvokoj estas la posedaĵo de tiuj, kiuj ilin subskribis, subskribas aŭ subskribos.

Tamen, du faktoj pravigas, ke mi subskribas tiun antaŭparolon :

1. Mi aktivas jam de 1957 por la protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj, kiuj jonigas aparte la atomojn de la vivaĵoj, perturbas aŭ detruas ilian nuklean ekvilibron. Ĉiuj konas la kuracan uzadon de la X-radioj. La partiklaj radiadoj rezultas de elementoj produktitaj de la esplorado kaj de la nuklea industrio, kaj de la armiloj, kiujn ili ebligas fabriki ; oni uzas same la radioaktivajn izotopojn en medicino, laboratorioj, industrioj, transportrimedoj. En 1962 mi fondis nian asocion, la A.K.R.D. : asocio kontraŭ la radiologia danĝero, kiu fariĝis en 1966 la A.P.J.R: asocio por la protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj, kiu celis kaj celas informi la publikon pri la nocivo kaj la danĝeroj de ĉiuj jonigantaj radiadoj.

De iom pli ol tri jaroj, mi proponis al la anoj de A.P.J.R. la projektojn de la alvokoj, kiuj fundamentas la nunan broŝuron. Korespondado kaj internaj bultenoj diskonigis al la korespondantoj iliajn diversajn rimarkojn, kiuj permesis progresivan alĝustigadon de tekstoj. Kompreneble, iliaj tekstoj estos ĉiam plibonigitaj, sekve de viaj rimarkoj. Tiuj, kiuj koncernas tian aŭ alian alvokon estos submetitaj al ĉiuj subskribintoj de tiu alvoko.

Parto el anoj de A.P.J.R. aprobis unu aŭ plurajn el tiuj alvokoj same, kiel personoj kaj asocioj, kiuj ne estas anoj de A.P.J.R.

Personoj aŭ asocioj interesataj pri unu aŭ pluraj el tiuj alvokoj ricevos, en lasta ĝisdatigo la alvoko(j)n dezirata(j)n kaj la liston de la asocioj, kiuj aprobis ĉiun el ili.

2. Mi deziras, ke la ideoj esprimitaj en tiuj alvokoj estu diskonigotaj en ĉiuj landoj kaj mi dankas Profesoron Helmut GOETZ, kiu jam tradukis la alvokon pri kodo de scienca deontologio german- kaj itallingven. La tradukoj en aliajn naciajn lingvojn estas evidente dezirataj; esperеble iuj el vi povas petadi tiucele alilandajn amikojn.

Tiuj ses alvokoj, same kiel la antaŭaj rimarkoj de Fraŭlino Genoveva KOSTE, estis esperanten tradukitaj (tradukoj reviziitaj de R. LEVREAUD). Ĉar mi estas esperantisto, mi deziras, ke esperantist(in)oj kaj asocioj de esperantistoj en tutmondo libere disvastigu en siaj respektivaj landoj la agojn, kiujn sugestos al ili tiuj alvokoj.

Dankon se vi sendas viajn rimarkojn, vian aprobon al persono aŭ asocio montrita kape de ĉiu alvoko, se ne al A.P.J.R., 80 rue des Noyers, Crisenoy, F 77390 Verneuil l'Etang (Francio).

Kore via                                                                La 84.03.08

Johano PINJERO
(france : Jean Pignero)
Aktivulo P.J.R.

# Rimarkoj rilataj al aro de "DEONTOLOGIAJ KODOJ"

**Tiuj KODOJ estas proponitaj al apartaj grupoj; ili estas destinitaj al la pripenso de individuoj.**

*La preparado kaj eblo de la atoma milito radikaligas la internaciajn konfliktojn. Tiuj faktoj malkovras ankaŭ, ke la modernaj socioj, unuformigitaj fare de la progreso de sciencoj kaj teknikoj, estas malpli kaj malpli kapablaj transformi siajn rilatojn, krei novajn rilatojn, elpensi sian estontecon kaj malfermi al homa espero kampon por eltrovoj.*

*La internacia konflikto estas la giganta sumo, sed ankaŭ la modelo de la aliaj homaj konfliktoj, kiuj ŝiras la modernan mondon : konfliktoj inter sociaj klasoj; edukaj, klerigaj, etnaj sistemoj; konfliktoj inter laborsistemoj; ekonomiaj aŭ religiaj konfliktoj; blinda impeto al la naturaj riĉaĵoj, daŭra agreso, kiu liveras la vivon homan aŭ bestan al detrua eksperimenta analizo.*

*Malakceptoj kaj malamikaĵoj trudas sin al ĉiuj niveloj de homaj renkontoj. La militmetodoj estas uzataj ĉie kaj de ĉiuj por certigi la triumfon de iu rigida amasstrukturo malprofite al alia. Sociaj klasoj, sindikatoj, politikaj partioj, trudgrupoj, edukaj sistemoj stariĝas unuj kontraŭ aliaj per alfronto, en kiu la zorgo plifortiĝi kaj konservi la venkeblon en la ofensivo kaj defensivo, ĉiam superas la intereson de la proklamita celo.*

*Ĉie la totalisma pretendemo faras el tiuj konfliktoj ne batalon por la vivo, sed batalon por la morto, por la pura kaj simpla malapero de aliaj : la aliaj grupoj, la aliaj individuoj. Ĉie, cetere, venko signifas la integradon de maso al alia maso, la abstrakton pli kaj pli nepersonan de la celoj, la frivolecon pli kaj pli malfirman de dezirataj valoroj.*

*La moderna mondo malvolvis rimarkinde kaj tute originale la povojn de la organizo. La planoj, la abstraktaj kaj ordonemaj projektoj pri la vivo de individuoj, kolorariaj de la teknika progreso, favoris produktadon, konsumadon kaj demografian kreskadon. Ili provizas tiujn havaĵojn, trudante*

*al individuoj normajn dimensiojn, kiuj reduktas ilian vivon al plenumo de la ordonoj de grupo.*

*Suferante tiun redukton de la individuo al la kolektivaj disciplinoj, ni sentas, ke kaptilo refermiĝas super ni. Ni vidas niajn projektojn kaj niajn intencojn misformigitaj de la sociaj strukturoj, kiuj plenumas ilin. La esploristo scias, ke la esplorado mortigas. Fizikistoj, kemiistoj, biologiistoj scias, ke la radiadoj, la polucioj, la genetikaj perversoj venenas, infektas, degradas tiujn, kiujn ili estas komisiitaj servi.*

*La kuracistoj scias, ke la toksa drogo stultigas; la agronomoj scias, ke la buldozo, la kemiaj sterkoj, la pesticidoj ruinigas la grundojn kaj la speciojn, ktp. Ni ĉiuj sentas nin ĝiukaptitaj en la premsonĝo, kiu obsedas, turmentas la homojn jam de kvindek jaroj : ĉu la homaro ne tuj devas pagi koste de sia vivo, aŭ de sia inteligento, aŭ de ambaŭ, la materiajn pozitivajn modifojn akiritajn per la sciencaj kaj teknikaj progresoj ?*

*Nu, estas ne la organismoj teknikaj, sociaj, profesiaj, politikaj, kiuj povas rompi la kaptilon, forigi la premsonĝon. Tiuj kolektivaj entoj ne liberigos sin mem de la kondiĉoj, kiuj igas ilin fortaj, ordonemaj, gigantaj. La politikaj ideologioj ne denuncos sin mem kiel teknikojn pri persvado destinitaj dissendi kredemon kaj dormon.*

*Neniam iu administro, partio, informorganismo, sindikato proklamos, ke la ambicio grandigi sin kaj fariĝi pli potenca, estas, por ĝi kaj ĝiaj anoj, principo, kiun ĝi ne povas malobei kaj kiu igas ĝin tiel stulta, kiel potencega. Neniu el ĉiuj, kies egoismo kaj potenco dependas de nia blindeco. klopodos klarigi al ni.*

*Male, oni ja scias, ke la eraroj de administroj rezultigas multobligon de la oficejoj, ke la eraroj de ekonomiistoj rezultigas multobligon de la planoj kaj planistoj ; oni scias, ke la sindikataj absurdaĵoj senlime generas la detalemajn kontrolistojn kaj multetaĝajn komisionojn.*

*Oni scias, ke la eraroj de politikistoj rezultigas senkompate severigon de la politika ordo kaj, ke ju pli registaro estas nejusta, kruela kaj senenergia, des pli ĝi estas grandioza kaj senmanke regula.*

*Senti la naŭzan premon de la fatalo enŝoviĝi en ĉiujn homajn rilatojn kaj devojigi ilin al la plej malbono, akcepti la dekretojn de la premsonĝo ĉar ĉiuj akceptas ilin, fali en kaptilon ĉar estas la homamaso, kiu kaptiĝas, ĉu estas tie la finvorto de la homa inteligento ?*

*Eblas tion ne kredi. Eblas malfidi la ŝajnan logikon, kiu devigus nin pagi per suferoj kaj detruoj la havaĵojn akiritajn per laboro dum tiom multaj generacioj.*

*Oni povas malfidi la senkuraĝiĝon, kiu kredigas al ni, ke la homaro estas kondamnita fare de sia propra evoluiga movo. Ĉiu scias, ke se la vortoj "justeco", "saĝo" havas signifon, tio estas, ĉar tiu signifo estis gajnita de viroj kaj virinoj, laŭlonge de nia historio. Gajnita signifo por ke ni uzu ĝin.*

*En la volo kaj inteligento de ĉiu el ni, de individuoj, kuŝas la energio de la justeco kaj de la saĝo.*

*Kiam drama situacio, kiel tiu kie troviĝas la nuntempa homaro, glitas mem al fatala terura konkludo, supera potenco povas balai la destinon kiel ombron. Tiu supera potenco estas la prirespondeco, kiun ĉiu prenas mem.*

*Tio estas la movo de pripenso, per kiu ni konsideras nian vivon kiel propraĵon nian, tute ; kiam ni decidas meti signifon, kie ĝi ne ekzistas, kaj justecon, kie oni ne trovas ĝin.*

*Tio estas nia sola kaj vera forto.*

*Tio ĉi estas dirita por klarigi, ke tiuj "kodoj de profesia deontologio" ne estas la senkaŭza produkto de utopia revado. Ne temas pri alvoko al la bonvolo de kelkaj estuloj mildaj, konsciencaj, cedemaj.*

*Petante tiujn, kiuj laboras; tiujn, kiuj serĉas; tiujn, kiuj kuracas; tiujn, kiuj informas; tiujn, kiuj administras, meti sin precize fronte al si mem; petante ilin mezuri la gradon de efikeco de sia verko, la gradon de respondeco, kiun ili havas en la korupto, en la krimoj grandegaj, videblaj aŭ ne, kiuj subfosas la nunan ekziston de la homaro;*

*proponante al ili en tiuj kodoj specon de kodo tre simpla, kiu permesas al ili juĝi kaj doni al si sian rolon kaj sian lokon en la venenoj, genocidoj, buĉadoj kaj psikaj krizoj, kiuj ruinigas la nunan homaron :*

- *oni ne serĉas flati bonajn konsciencojn,*
- *oni ne intencas formi grupojn, kiuj povus postuli parton en la prestiĝoj kaj tondraj postuloj de la partioj,*

- *oni nur avertas ĉiun uzi sian intelekton por scii kaj sian volon por tion fari.*
- *Sume, oni donas al ĉiu la okazon ŝpari la ekkriajn prudaĵojn, kiuj akompanas la malkovron de nova kolektiva malbonfaro.*

*Se kodo de deontologio estas revo, tio estas, ĉar la realismo ordonas ne esti maltrankviligita de la malbono, kiun oni faras.*

*Rifuzante tiujn kodojn, la "realistoj" estus liberigitaj el tiu deca konfuzo, kiu nepras kiam iu grava polucio kriigas pri "la malsperta sorĉisto", iu plenefika fuzaĵo igas singulti pri la "genocidoj", kaj iu genetika manovro igas tremi pro rememoro pri D-ro Faŭsto kaj lia kunulo.*

*Tiuj kodoj ŝparus ankaŭ protestojn pri "la nelacigebla esplorado, malfeliĉe ligita kun kondiĉoj de tempo, plibonigo, kompleteco, kiuj ne permesas eskapi al efikoj bedaŭrindaj sed momentaj..."*

*Sed, se oni bonvolas anstataŭigi tiujn ritajn gurdaĵojn per unu momento de klarvido, oni ekkonscios, ke tiuj kodoj sin turnas, sin direktas al singularaj personoj, el kiuj ĉiu estas sekrete kaj tute informita pri la vortoj, kiujn ili rememorigas.*

*Donante tiujn tekstojn por legi ĉirkaŭ oni, al plejeble multaj kaj diversaj personoj, oni ne celas kriigi sloganojn,*

*oni intencas veki tiun akutan atenton, kiun ĉiu dediĉas al sia propra destino, la aĵo plej grava, sume, por ĉiu mem. Tiu atento povos havigi al li la memoron pri la grandega teksilo, kie teksiĝas niaj vivoj, kie la plej granda malbono povas fariĝi la plej granda bono, se ni plene prenas sur nin nian verkon, donante al la tuta homaro la plej bonon el ni mem.*

Genoveva KOSTE
(Geneviève Coste)

Sendinto : koordinatoj
de la PERSONO,
aŭ stampo de la ASOCIO

# Grupo "TUTE ANTINUKLEAJ"

## Universala grupo de personoj kaj asocioj*, senperfortaj, fundamente, tute antinukleaj

La nuklea energio estas natura fakto ekzistanta en la universo jam de ĝia origino. Sed ĝia freŝa scienca kono estis rapide maskita de la eksterordinara pligrandiĝo de ĝia artefarita produktado, tiel ke, jam de la 2a de decembro de 1942, la nuklea energio estas konfuzita praktike kun sia sola industria produktado kaj ĉiuj konsekvencaj utiligoj, sen referenco pri ĝia origino kaj natura ekzisto. Ni akceptas ĉi tie tiun klarigon.

La donitaĵoj de la ekologio** kaj la celoj de la ekologiistoj estas pli kaj pli konataj en ĉiuj landoj, sekve de la multaj difektoj truditaj al la naturo, sekve de la eloviĝo kaj de la kreskiĝo de la "malsanoj de civilizo", sekve de la fiziologia dekadenco, de la minacoj de tiu dekadenco kaj de morto imputeblaj al iuj aplikoj de iuj sciencoj kaj al iuj industriaj teknikoj, sekve de la eblo de malapero de gravaj grupoj da individuoj per la ĉiuspecaj armiloj de masiva detruo amasigitaj de la regantoj en gravaj landoj, kiaj ajn estu la politika formo de ilia reĝimo, la nombro kaj la graveco de la individuaj liberoj, kiujn la loĝantoj ĝuas reale ĉiutage***.

-----------------------

* Por ni, asocioj estas ĉiuj formoj de grupoj da personoj : asocioj, kooperativoj, sindikatoj, partioj, ktp, deklaritaj aŭ ne, strukturitaj aŭ ne, kiuj zorgas nur aŭ precipe, aŭ akcesore pri ĉiuj aŭ unu el la problemoj de la nukleo.
** Ekologio estas la parto de la biologio, kiu studas la rilatojn de la vivantaj estuloj kun ilia natura medio. Sed ne necesas esti biologo por kompreni la gravecon de la ekologio : estas ĝuste la ekologiaj aktivuloj batalantaj pri biologia agrikulturo, pri maro aŭ atmosfero nepoluciitaj, pri mondo sen nukleo, ktp, kiuj devigis morale la scienculojn malvolvi la studon de ekologio.
*** La franca ĵurnalo "La Mondo", en sia numero de 80.10.26, publikigis la artikolon "Laŭ (franca) parlamenta raporto, la franca nuklea potenco

Estas normale, kaj por ni evidente, ke politika karaktero estu agnoskita al la ekologio, ĉar tiu ĉi estas nature politika, laŭ la nobla senco de tiu termino, kaj ĉiu politiko havas, plejofte, ekologian reefikon. Ĉar la politikista praktiko prezentas malsamajn celojn laŭ la partio, la ekologio fariĝinta politika estos agnoskita kiel celo esenca aŭ akcesora. La PERSONOJ kaj la ASOCIOJ subskribintaj la nunan alvokon opinias, ke la ekologia celo estas esenca, sed ili precizigas, ke iliaj agoj por la protekto kontraŭ la malutiloj kaj la riskoj imputitaj kaj imputeblaj al la **NUKLEO** estas kaj povas esti nur parto de la **EKOLOGIA AGADO.** Sed ilia sperto permesas ilin proponi politikon **FUNDAMENTE, TUTE ANTINUKLEAN,** kaj deziri, ke vi aprobu la nunan alvokon favore al ilia grupo, **UNIVERSALA** ĉar la nuklea polucio ignoras ĉiujn landlimojn kaj nocas al la tuta regno tera: minerala, vegetala, animala, kaj al ĝia ĉirkaŭo (radioaktiva polucio de tero, akvoj, atmosfero).

Nia grupo "TUTE ANTINUKLEAJ" ekzistas jam de la 7a de marto de 1982 kiel fakta asocio ne deklarita, kies sekretariecon plenumas provizore la Asocio por protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj. La PERSONOJ kaj la ASOCIOJ, kiuj aprobas la nunan alvokon povas do krome aliĝi al nia GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" ; ili konfirmos sian aliĝon dum la konstitua ĝenerala asembleo, se ili akceptas la statutojn,

-----------------------------

estigus nun 20 milionojn da mortintoj kaj tiom da vunditoj dum milito". Ĝi klarigas, ke sekvus deviga malorganizo ĉe la malamikaj naciaj aktivaĵoj. Post 1985, tiuj nombroj atingus 60 megamortintojn kaj tiom da vunditoj. La deputito, kiu raportis tiujn afablajn antaŭdirojn, ne aldiris, ke, ĉar la franca frapforto estas defensiva, Francio estus antaŭe ekstermita de la malamika frapforto ofensiva, kelkdekoble supera (vidi la tabelon de la "Potencoj nukleaj strategiaj kaj taktikan en 1979, paĝon 23 de la verko : "La armiloj de amasa detruo kaj la politiko de franca defendo" (en franca lingvo) de Y. Le Hénaff (n° 79/80 de P.R.I.). Se Francisko Mitterrand, prezidento de Francio, ĵetus la gallan Kokon kontraŭ la moskvan Urson, eble en 1984, mortigonte 40 000 000 kaj vundonte 40 000 000 Rusojn el 270 000 000 da loĝantoj, Francio estus komplete ekstermita dum la sekvanta kvaronhoro. Kaj tiu patriota dialogo povus esti inaŭgurita per salvo de neŭtronaj bomboj. Kaj se tiu milito havus internacian karakteron, pli ol 1 miliardo da mortintoj kaj pli ol 1 miliardo da vunditoj rezultus de uzo de nura duono de la ekzistantaj nukleaj armiloj (Raporto de la "Internacia komitato de ekspertoj en medicinaj sciencoj kaj publika sano", kolektita en 1983. Vidi la bultenon "Protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj", n°96, de la 3a trimestro de 1983).

kiuj ĉi tie estos diskutitaj kaj kiuj komplete klarigos ĝiajn motivojn, celojn kaj agrimedojn.

Iaflanke, PERSONOJ kaj ASOCIOJ jam subskribintaj la nunan alvokon, estas motivigitaj de la konstato pri la graveco de la malutiloj kaj riskoj de la nuklea industrio civila kaj milita. Ili opinias, ke necesas starigi bilancon entutan koncerne ĉiujn avantaĝojn kaj ĉiujn malutilojn de tiu industrio kaj de ties aplikoj. Iliaj malutiloj kondiĉas la estantecon kaj la estontecon de la homaro kaj, en tiu bilanco, ili nombras multe pli ol la avantaĝoj. Konsekvence, la ĉefa celo de la anoj de GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" estas informi ĉiujn homojn en ĉiuj landoj pri la karaktero entute tre negativa de la produktado kaj uzado de la nuklea industrio; tiu informo devus konduki al **ĜENERALA MALKONSENTO PRI LA NUKLEO** profite al aliaj fontoj de energio. Tiuj aliaj fontoj povas anstataŭi la nukleon.

La PERSONOJ kaj ASOCIOJ subskribintaj konstatas, ke la povoj politikaj, ekonomiaj, industriaj, ktp, estroj de la nukleo, trudis ĝin per perfido aŭ per la potenco de sia polico. Ili plu trudas ĝin per la inerciforto de la plenumita fakto, per la potenco de siaj propagandrimedoj, per la konsento de la grandaj politikaj partioj, kiuj inkludas ĝin en siaj voĉdonoj de la naciaj buĝetoj kaj la partieco de la gazetaro. Tamen, persvaditaj pri la valoro de SENPERFORTO, ili rifuzas ĉiun fizikan perforton, kiu celas senpere fizikajn personojn aŭ kiuj trafas ilin nerekte.

Ili submetas al via studo jenajn bazajn principojn :

* La PERSONOJ kaj la ASOCIOJ partoprenantaj estas **FUNDAMENTE, TUTE ANTINUKLEAJ** pro tio, ke ili deklaras sian kontraŭstaron al ĉiuj instalaĵoj de la nuklea industrio civila aŭ milita, funkciantaj, konstruataj aŭ planitaj, kaj al ĉiuj politikoj pri nukleaj registaraj interkonsentoj (eksporto aŭ importo de teknologioj, de nukleaj brulaĵoj, de radioaktivaj produktoj, kiuj povas utili al nuklea armilaro, de nukleaj armiloj, de radioaktivaj ruboj).

* Ili denuncas la povojn, estrojn de la Nukleo, kiel la unuajn kaj nunajn instigantojn de perforto kontraŭ la loĝantaroj kaj ties posteularo. Tamen, ili mem estas SENPERFORTAJ pro tio, ke ili rifuzas plenumi ĉiujn agojn de fizika perforto vole direktitajn kontraŭ fizikaj personoj aŭ kapablaj atingi ilin nerekte.

* Ilia GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" ne havas kaj ne havos aliajn celojn ol tiujn indikitajn ĉi-supre; ĝi rifuzas sin miksi en la agojn plenumitajn por aliaj celoj eĉ se ĝiaj anoj aprobas ilin, interalie de PERSONOJ aŭ de ASOCIOJ anoj de nia GRUPO.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" konsistos el centra grupo kaj sekcioj, fondotaj laŭ la lokaj ebloj kaj la inklinoj de siaj fondintoj. Se ne eblas fondi grupon en iu lando, la tieaj loĝantoj povos partopreni grupon de najbara lando.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ", dum sia konstitua ĝenerala asembleo, decidos sian nomon, sian socian sidejon, sian agprogramon, tiuj ĉi decidoj estos revizieblaj dum la sinsekvaj Ĝ.A. La voĉdono per korespondo funkcios por ĉiuj aliaj kunvenoj.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" rememorigas en ĉiuj okazoj sian pozicion TUTE ANTINUKLEAN.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" kreos inter la partoprenantaj PERSONOJ kaj ASOCIOJ reton de informoj kaj de aktiva interhelpo, kiu utiligos eventuale la ekzistantajn retojn de la partoprenantaj grupoj;

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" priatentos kaj klopodos realigi ĉiujn komunajn senperfortajn agojn.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" diskonigos la informajn dokumentojn (verkojn, deklarojn, gazetojn, bultenojn, artikolojn, afiŝojn, ktp) kaj la agojn (demarŝojn, paŝadojn, manifestaciojn, apelaciojn ĉe la justico, ktp) de siaj partoprenantoj en ĉiuj landoj. Tiucele, krom la lingvoj naciaj aŭ etnaj kaj eventuale alilandaj praktikataj kutime de ĉiu el personoj aŭ asocioj partoprenantaj, tiuj ĉi utiligos bezone internacian neŭtralan lingvon elektitan de la konstitua Ĝ.A. aŭ de alia Ĝ.A. poste kunvenigota. Atendante, la A.P.J.R. : Asocio por protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj sugestas tiucele uzi esperanton.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" laboros por kora konsento inter siaj aliĝantoj kaj la aliaj asocioj ne partoprenantaj, kiuj adoptas la samajn regulojn de aktiva senperforto, por konigi al ili niajn celojn kaj apliki kun ili komunajn celojn.

Alvoko diskonigita en la 80.10.27 La...............
Ĝisdatigo n° 11 : 84.02.01. Por la GRUPO T.A. :

Sendinto : koordinatoj
de la PERSONO,
aŭ stampo de la ASOCIO

# Grupo
# "KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO"

**Alvoko pri via aliĝo al nia universala grupo de personoj kaj asocioj aktivantaj por starigi : Universalan Kodon de Scienca Deontologio, supernaciajn servojn de sciencaj rekomendoj kaj decidoj, kaj Universalan Kortumon.**

Ni, INDIVIDUOJ, sciencistoj aŭ ne-sciencistoj, persone agantaj, aŭ ASOCIOJ*, opinias, ke ĉiuj civilizacioj suferas pro malutiloj ofte gravaj, kaj travivas gravajn riskojn sanitarajn, sociajn kaj politikajn, je mallonga, meza, longa aŭ tre longa templimo.

Laŭ ni, parte la kaŭzoj de tiuj malutiloj kaj riskoj estas jenaj : 1) la libereco lasata al la sciencistoj labori por la bono aŭ la malbono, pretekste, ke la scienco estas senkulpa kaj, ke ne eblas haltigi la "progreson" ; 2) la akaparo, por la bono aŭ la malbono, de fundamentaj aŭ aplikataj esploroj, malkovroj aŭ inventaĵoj, eĉ malnovaj, fare de korpaj aŭ moralaj personoj: "decidantoj" = regantoj, disponantaj trudajn povojn kontraŭ la individuoj.

La scienco, universala ĉar ĝiaj leĝoj aplikiĝas en ĉiuj lokoj kaj tempoj, la ega potenco de kelkaj regantoj de la prirespondantoj de iuj naciaj kaj multnaciaj entreprenoj, estroj rektaj aŭ peraj de milionoj da personoj, la ega potenco de iuj modernaj rimedoj malutili al milionoj da individuoj, devigas nin havigi al nia alvoko universalan eĥon kaj proponi protektajn rimedojn, kiuj transiras la limojn de niaj propraj nacioj.

Kvankam la difinoj de la bono kaj de la malbono estas plej ofte sociaj kaj cirkonstancaj, ni opinias, ke estas dezirinde, eble kaj eĉ necese fiksi ilin per komuna akordo kaj laŭ universala spirito. La malbono signifus, en tiu ĉi alvoko, la malutilon aŭ/kaj la riskon truditajn de aplikoj de iuj

---

* Asocioj, laŭ ni, estas ĉiuj ajn grupoj : asocioj, kooperativoj, sindikatoj, deklaritaj aŭ ne, strukturitaj aŭ ne, zorgantaj unuanure aŭ precipe, aŭ akcesore pri problemoj rilate la aplikojn de la sciencoj.

sciencoj al individuoj aŭ grupoj de individuoj (triboj, etnoj, popoloj, ktp) kontraŭ aŭ ekster ilia volo aŭ kun ilia konsento akirita pro tendenca informado, rekte aŭ pere (ekzemple agante sur la homan medion). La bono signifus, kontraŭe al la malbono, la kontrolitan foreston de tiuj malutiloj kaj/aŭ riskoj.

Ni opinias, ke urĝegas tiri instruojn el tiuj konstatoj kaj ni petas vin pripensi jenajn proponojn koncerne la rimedojn por : 1) helpi la sciencistojn, kiuj rifuzas labori por la malbono 2) malhelpi la sciencistojn labori por la malbono; 3) subteni la "decidantojn", kiuj rifuzas labori por la malbono ;
4) malhelpi la decidantojn uzi riproĉinde esplorojn, malkovrojn, inventaĵojn, eĉ malnovajn.

Tio ĉi ne signifas, ke la sciencistoj aŭ la decidantoj aplikas ĝenerale la malbonon pro la malbono. Plej ofte, malkovro aŭ inventaĵo okazas hazarde aŭ pro laŭdindaj motivoj. Kio povas esti riproĉinda, tio estas la uzado farita aŭ eble farota el tio, tuj aŭ iam poste, pretervole aŭ konscie, daŭre aŭ nedaŭre.

En la nuna etapo de niaj pripensoj, ni proponas tri ĉefajn rimedojn, antaŭe akceptante, ke vi proponos aliajn, same aŭ pli valorajn.

I. La unua rimedo estus la starigo de **UNIVERSALA KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO**, difinanta la moralajn regulojn pri la uzo de la sciencoj fare de la sciencistoj kaj decidantoj por, en ĉiuj landoj, sekurigi individuojn kontraŭ la malutiloj kaj la danĝeroj de la sciencaj aplikoj, eĉ se tiuj aplikoj okazas en aliaj landoj ol tiu, kie vivas la homoj suferantaj aŭ riskantaj suferi pro tio. Tiu kodo estus aplikebla al ĉiuj sciencistoj, diplomitaj aŭ ne, kaj al ĉiuj decidantoj. Ni precizigu, ke ĝi ne estus starigita - kiel okazas pri iuj naciaj kodoj pri deontologio - por fakte protekti la sciencistojn kaj la decidantojn kontraŭ la punaj persekutadoj, nek por permesi al la sciencistoj konstitui kaston izolitan de tiuj personoj, kiuj povas suferi pro iliaj laboroj, nek por permesi starigi kaston de decidantoj trudantaj siajn decidojn al la regantoj, sciencistoj, grupoj aŭ individuoj.

II. La dua rimedo estus starigi **SUPERNACIAJN SERVOJN PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ** komisiitajn:
- strikte apliki la universalan kodon de scienca deontologio,

- pristudi la novajn malkovrojn kaj inventaĵojn por kontroli ties konformecon al la kodaj preskriboj kaj tuj informi la sciencistojn en la tuta mondo,
- konstante provizi ĉiujn sciencistojn per la informoj ebligantaj al ili interrilatigi sian fakon kun sia scienco kaj la proksimaj sciencoj,
- konstante informi la decidantojn de la diversaj povoj pri rekomendoj kaj decidoj, kiujn ili mem faras, se tiuj ĉi povas influi al aliaj decidoj,
- publikigi siajn rekomendojn, siajn decidojn, kaj la decidojn postsekvantajn faritajn aŭ ne de la decidantoj,
- konstante permesi la transformigon de malkovroj, inventaĵoj, esploroj, en konkretajn aplikojn, interalie industriajn,
- limigi tiun tranformigon al tiaj aŭ aliaj aplikoj,
- malpermesi portempe aŭ definitive iujn aŭ ĉiujn aplikojn de malkovro aŭ elpenso, kia ajn estas ĝia malnoveco,
- transsendi al la universala kortumo (vidi ĉi-poste) la dosierojn de la sciencistojn, kiuj rifuzas apliki la decidojn.

III. La tria rimedo estus la starigo de **UNIVERSALA KORTUMO**, rekte metita je la dispono de la individuoj, asocioj, registaroj en ĉiuj landoj, kiuj denuncas la malutilojn aŭ/kaj riskojn pri iuj aplikoj de iuj sciencoj. Tiu kortumo ekzamenas interalie ĉiujn petojn de sciencistoj koncernataj pro la decidoj de la supernaciaj servoj pri rekomendoj kaj decidoj. Tiu kortumo estus reprezentata laŭeble en ĉiu lando.

Ni invitas ĉiujn personojn interesatajn pri tiu propono, interalie la juristojn, partopreni en la redaktada komitato de la konstitua akto de tiu **UNIVERSALA KORTUMO DE JUSTICO.**

Tiuj tri ĉefaj rimedoj konsistigos - dum ĉiu el ili ne estos leĝoforta -, la precipajn celojn de la **UNIVERSALA GRUPO "KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO"**, kiu prezentiĝas kiel morala forto. Por la efektivigo de siaj celoj :

- la GRUPO organizos ĉiujn utilajn kunvenojn kaj diskonigos ĉiujn utilajn dokumentojn ;
- la GRUPO kunvenigos ĝeneralan konstituan asembleon, kiu decidos pri sia nomo, siaj statutoj, sia agprogramo. Nuntempe, ĝi prezentiĝas kiel libera asocio, kies A.P.J.R. (Asocio por protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj, 80, rue des Noyers, Crisenoy, F77390 VERNEUIL L'ETANG) plenumas la sekretariecon ;

- la NACIAJ SEKCIOJ de la GRUPO povos kunvenigi ĝeneralajn konstituajn asembleojn por konstitui asociojn liberajn aŭ deklaritajn laŭ la leĝoj de siaj landoj ;
- la GRUPO celas nur tion, kio estas ĉi-supre indikita. Post la adopto de siaj statutoj, ĝi havos plu nur statutajn celojn.

Alvoko diskonigita en la 80.12.18
Ĝisdatigo nº 7 : 84.02.01

La.................
Subskribo de la sendinto :
Eventuala indiko de ties adreso :

## FUNDAMENTA TEKSTO

# rilate

# * la Universalan Kodon de Scienca Ekologio,
# * la Supernaciajn Servojn pri Sciencaj Rekomendoj kaj Decidoj,
# kaj la Universalan Kortumon de Justico.

Tiun tekston preparis parto de la personoj kaj asocioj, anoj de la Universala Grupiĝo tiucele konsistigita. Tiu ĉi estas projekto, ne definitiva teksto. Do, ni bonvole submetas ĝin al vi. Viaj eventualaj rimarkoj povos esti ĝeneralaj aŭ/kaj propraj al iu frazo. Ni numeris ĉiun alineon de nia teksto por faciligi la redaktadon de viaj propraj rimarkoj kaj la studadon, kiun ni faros pri tiuj. Ni prezentos al la membroj de nia redakta komitato ĉiujn ricevitajn rimarkojn; ĉi tiuj tiam redaktos plibonigitan tekston, kiun ili sendos al ĉiuj korespondantoj kaj anoj de nia Universala Grupiĝo.

## I. DIFINOJ

1 Scienco estas tuto de konoj kaj eksperimentoj rilataj al iuj korpoj, elementoj, faktoj kaj fenomenoj de la mondo minerala, vegetala, animala (i.a. homo) kaj de ties ĉirkaŭo planeda kaj eksterplaneda, interligitaj per objektivaj, komunaj proprajôj.

2 Sciencist(in)o estas persono diplomita aŭ ne, kiu zorgas pri scienco, daŭre aŭ okaze.

3 La scienca deontologio estas la tuto de moralaj reguloj, kiujn la sciencistoj sin devigas respekti en sia laboro, aŭ kies respekton oni trudas al ili.

4 La kodo de scienca deontologio fiksas leĝe la regulojn de tiu deontologio, la eblojn respekti ĝin kaj la aplikeblajn sankciojn kontraŭ la sciencistoj, kiuj ĝin malobeas. Tiu kodo estas universala pro tio, ke la sciencoj estas universalaj en siaj esploradoj, elpensoj, aplikoj, utiloj, riskoj, malutiloj. Inverse, aktivado ne povas pretendi sin scienca, aŭ oni ne povas al ĝi riproĉi esti scienca, se ĝi ne respondas al tiu karaktero de universaleco. La reguloj de tiu kodo estas modifeblaj.

## II. RAPORTO PRI MOTIVOJ

5 Multe da sciencistoj priarogas la senkulpon de la "Scienco" kaj la nekontraŭstareblan antaŭeniradon de la "Progreso" ("Progreso estas nehaltigebla") por malpermesi al si demandi, ĉu iliaj laboroj, esploradoj aŭ elpensoj prezentas aŭ prezentos malutilon kaj/aŭ danĝeron por la naturo kaj por la vivuloj, interalie por la homoj kaj ilia posteularo.

6 Sciencist(in)o povas ne kompreni la gravecon de siaj esploradoj, eltrovo aŭ elpenso, kies apliko fare de li (aŭ ŝi) aŭ de aliaj, povos, senprokraste aŭ prokraste, sin montri malutila aŭ/kaj danĝera.

7 Historio atestas sekretan konsenton pli kaj pli gravan kaj reciprokan inter sciencistoj kaj gvidantoj, decidantoj de povoj politikaj, ekonomiaj, industriaj, militistaj, ktp. Unuflanke, iuj sciencistoj mem proponas al iuj gvidantoj siajn esplorojn, eltrovojn aŭ elpensojn, eĉ se ili estas aŭ povas fariĝi malutilaj aŭ/kaj danĝeraj; aliflanke, iuj el tiuj gvidantoj petas aŭ postulas de sciencistoj, ke ili plenumu iujn laborojn, esplorojn, eĉ se la rezultoj de tiuj laboroj aŭ esploroj estas dezirataj malutilaj aŭ/kaj danĝeraj, aŭ povas montriĝi tiaj.

8 Ĉar la kresko de sciencaj konoj en iuj regnoj, ilia komplekseco neprigas septadon de multaj sciencaj kampoj, la ĉiuspecaj sekretoj, kiuj ilin ĉirkaŭas, faras, ke la sciencistoj perdas la mastrecon super sia scienco kaj, ke la gvidantoj de tiuj regnoj disponas superregadon kaj malutilas aŭ povas malutili grave al propraj kaj alilandaj popoloj.

9 La apliko al militista kampo de iuj elpensoj aŭ eltrovoj konsistigas prioritaton aŭ eĉ ekskluzivecon por la gvidantoj de nacioj evoluintaj kaj/aŭ riĉaj. Ili tiel disponas povon pri ĉantaĝo, kies plenumo povas signifi la morton kaj la dekadencon fizikan kaj fiziologian de milionoj da individuoj kaj nerebonigeblan socian malorganizadon.

10 La imperiismo de la gvidantoj de tiuj nacioj - kia ajn estu ilia politika reĝimo - instigas tiujn gvidantojn korligi al si la klientaron de satelitaj nacioj, vasalaj ekonomiaj, industriaj grupoj, kies responduloj, kvankam malpli potencaj, povas iniciati procezojn de malstabiligo, lokajn militojn, kies pligraviĝo riskos eskapi al ĉiu kontrolo, kiam tiuj procezoj ne estas truditaj de la gvidantoj aŭ/kaj de la

feŭdestraj ekonomiaj grupoj.

11 Federacio de nacioj akceptantaj supernaciajn, politikajn regulojn, fondita por preventi la eksplodon de amasdetrua milito, permesus bridi tiujn danĝerojn, malpliigi ties gravon, transformi armelspezojn en pacelspezojn. Supernaciaj organizadoj de civitanoj kontribuus al tiu ŝanĝiĝo.

12 Por doni universalan pravigon al la protekto kontraŭ la malutilaj aŭ/kaj danĝeraj aplikoj de iuj sciencoj, konvenas redakti kaj adoptigi **UNIVERSALAN KODON DE SCIENCA DEONTOLOGIO**, kiun respektu la sciencistoj kaj la diversaj povoj, kiuj evoluigas la sciencan esploradon kaj/aŭ utiligas la aplikojn de tiuj sciencoj. Por diskonigi tiun projekto pri KODO, la **SUPERNACIAJN SERVOJN PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ**, kaj la **UNIVERSALAN KORTUMON DE JUSTICO**, kiuj estas ĝiaj fundamentaj aplikrimedoj, la sciencistoj kaj la ne-sciencistoj estas invititaj partopreni en la GRUPIĜO-KODO : UNIVERSALA GRUPIĜO DE LA PERSONOJ KAJ DE LA ASOCIOJ AKTIVANTAJ POR STARIGI UNIVERSALAN KODON DE SCIENCA DEONTOLOGIO, SUPERNACIAJN SERVOJN PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ, KAJ UNIVERSALAN KORTUMON DE JUSTICO. Kiam tiu **KODO** havos leĝoforton en unu regno, la anoj de la Grupiĝo KODO kontrolos ĝian plenumadon kaj proponos ĉiujn plibonigojn pri ĝia redakto.

## III. MORALAJ RAJTOJ KAJ DEVOJ DE LA SCIENCISTOJ

13 **Artikolo 1a.** La praktiko de la scienca esplorado, en ĉiuj siaj niveloj de ellaborado, postulas de kiu sin dediĉas al ĝi, la publikan agnoskon de la leĝoj pri la honesteco kaj la obeon al tiuj leĝoj pri kiu la esploristo sin ŝuldigas.

14 **Art. 2a.** La scienca esplorado celas la kreskadon de la homa scipovo kaj la plibonigon de la sorto de ĉiuj homoj.

15 **Art. 3a.** La scienca esplorado povas, neniel, celi, falsi, kaŝi aŭ maski la eksperimentojn, kiuj informas la homojn pri la naturo de la aĵoj, pri la medio en kiu ili vivas kaj pri la modifoj naturaj aŭ artefaritaj de tiu medio.

16 La scienca esplorado nepre informu la homojn, en ilia tuto, pri tiuj realaĵoj.

17 Art. 4a. La scienca esplorado povas, neniel, konsideri, rigardi homajn estulojn aŭ homajn grupojn kiel eksperimentan materialon kaj submeti ilin al vivkondiĉoj artefarite fiksitaj esplorcele.

18 Tial, estas ekskluzivitaj de la scienca esplorado ĉiuj ĥirurgiaj operacioj kaj ĉiuj genetikaj manipuladoj uzantaj la metodon pri diferencoj, kiu determinas la pozitivajn kvalitojn de homaj estuloj, metante ilin en kondiĉojn, kiuj malpermesas tiujn kvalitojn kreski.

19 Art. 5a. Nenia scienca esplorado povas celi la realigon de teknikaj operacioj, kiuj modifas la biologian homan medion, difektante la medion kaj igante ĝin netaŭga por la homa vivo, tia kia plenumata per la tuta ekzercado de la taŭgoj kaj kapabloj de ĉiu.

20 Art. 6a. La scienca esplorado ne estas profesio : estas digno. Ĝia celo ne estas la materia riĉiĝo de kiu sin dediĉas al ĝi. Tial la salajro de la esploristo estas fiksita tiel, ke li havu decan vivon kaj povu praktiki la esploradon pleje laŭ siaj intelektaj kapabloj. Tiu salajro kreskas nur laŭ la ordinaraj reguloj de la aĝo kaj de la familia situacio. Nenia kreskigo de la salajro, nenia financa avantaĝo ligiĝas al la pozitivaj aŭ negativaj ŝancoj de la esplorado. Nenia partopreno al profitoj de la komerca ekspluatado de elpensoj estas permesita.

21 Art. 7a. Ĉiu esploristo devas agnoski, ke la homa persono estas libera, plene disponas sian penson, tiamaniere, ke ia ajn ago, celanta senigi homon je sendependo de lia prijuĝo, - aŭ per psikologiaj ebloj de premdevigo, aŭ per materiaj, sekretaj kaj ellaboritaj teknikoj -, estas ago kontraŭa al la scienca honesteco kaj sekvigas la eksigon el la scienca komunumo de ĉiu esploristo, kiu malobeas tiun artikolon.

22 Art. 8a. La scienca esplorado konsistigas novan socian funkcion, kies statuto ne estas difinita. La morala respondeco, kiu trudiĝas al la esploristo pro la efiko kaj la komplekseco de la modernaj sistemoj de eksperimentado, ne permesas al la esploristo esti submetita al la ŝtatsaĝo. Ĝi ankaŭ ne permesas esti submetita al la ordonoj de privata entrepreno.

23 Do konvenas difini, nune, la signifon kaj la naturon de nova publika "planeda" ofico, kies buĝeto, organizado kaj strukturoj estos precizigitaj konforme al la antaŭaj reguloj post popola konsulto.

24 **Art. 9a.** Ĉiu viro aŭ virino, kiu sin devontigas en la scienca esplorado, sub la titolo de studento aŭ de instruisto, devas publike deklari, per sia honoro, kaj subskribi la promeson respekti la regulojn de la kodo pri scienca deontologio.

25 **Art. 10a.** Ĉiu profesoro en scienca disciplino nepre klarigu tiun kodon kaj montru ĝian pravecon al ĉiuj siaj studentoj.

## IV. LA KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO

26 **Art. 11a.** Laŭ la artikoloj 1a ĝis 10a ĉi-supre, estas fondita, en la dato de ........... **UNIVERSALA KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO**, kiu fiksas la regulojn, kiujn respektu la sciencistoj en ĉiuj regnoj dum sia laboro.

27 **Art. 12a.** Tiu KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO havas universalan rolon, ĉar ĉiuj sciencoj estas universalaj. La sciencistoj povas priarogi la disponojn de tiu KODO, se ĝi ankoraŭ ne estas leĝe adoptita en ilia regno.

28 **Art. 13a.** La esenca celo de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO estas :

29 a) rekomendi al la sciencistoj ĉiujn klopodojn efektivigendajn en siaj esploroj, senprokraste aŭ prokraste, por ke tiuj esploroj ne difektu aŭ ne risku difekti la naturon : biosferon kaj vivantajn estulojn ;

30 b) malpermesi tiujn esplorojn, senprokraste aŭ prokraste, provizore aŭ porĉiame, se ili trafas aŭ trafos la naturon : biosferon kaj vivantajn estulojn.

31 **Art. 14a.** En la praktiko de siaj laboroj, ĉiu sciencisto, por kontroli ĉu ili estas aŭ restas konformaj al la preskriboj de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO devas sin turni al unu el la SUPERNACIAJ SERVOJ PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ (vidi ĉiposte) fondita en lia aŭ alia regno. Tiu devo estas persona kaj nekontestebla.

## V. SUPERNACIAJ SERVOJ PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ

32 **Art. 15a.** Ĉiu sciencisto devas akcepti la ekziston kaj subteni la agadon de tiuj SERVOJ, eĉ se ili ne posedas delegacion en lia regno. Tiuj SERVOJ estas komisiitaj:

33 15a.1e) apliki nur kaj strikte la preskribojn de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO;

34 15a.2e) studi la novajn eltrovojn kaj elpensojn por kontroli ties nuran konformecon al la preskriboj pri la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO : ili deduktas de tio, aŭ REKOMENDOJN, kiuj rolas nur averte, aŭ DECIDOJN, kiuj kunportas moralan devon aplikeblan senprokraste aŭ prokraste ;

35 15a.3e) en ĉiu regno, kie ĝi estas agnoskita, ĉiu SERVO uzas la nacia(j)n lingvo(j)n en siaj rilatoj kun la sciencistoj de tiu regno aŭ de aliaj regnoj parolantaj tiun lingvon (aŭ unu el tiuj lingvoj). Por la aliaj interlingvaj rilatoj, Esperanto estas rekomendita ;

36 15a.4e) respondi al la nuraj demandoj pri scienca deontotologio, kiujn direktas al li iu ajn persono (sciencist(in)o diplomita aŭ ne, ne-sciencist(in)o aŭ asocio) kaj alporti daŭre al ĉiuj sciencistoj ĉiujn informojn, kiuj permesas al ili ligi la deontologiajn devojn pri sia fako kun tiuj pri sciencoj sia kaj proksimaj ;

37 15a.5e) informi daŭre la publikan opinion kaj la gvidantojn de la povoj politikaj, ekonomiaj, industriaj, ktp, pri la REKOMENDOJ kaj DECIDOJ, kiujn ili prenas, por ke tiuj gvidantoj apliku ilin en la ekzerco de siaj povoj kaj, ke la publika opinio sciu, ke la gvidantoj estis informitaj pri tiuj ĉi ;

38 15a.6e) publikigi la alprenitajn decidojn de tiuj povoj sekve de la komuniko pri iliaj propraj REKOMENDOJ kaj DECIDOJ, aŭ la foreston de la decidoj, kiuj estis esperitaj de tiuj povoj ;

39 15a.7e) permesi ĉiumomente la transformon de eltrovoj aŭ elpensoj, novaj aŭ malnovaj, en difinitajn, praktikajn aplikojn, i.a. industriajn, se tiuj aplikoj estas konformaj al la preskriboj de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO ;

40 15a.8e) limigi aŭ malpermesi, provizore aŭ definitive, tian aŭ tian aplikon de scienco, ĉar ĝi montriĝas malutila aŭ danĝera ;

41 15a.9e) plejeble vaste konigi siajn REKOMENDOJN koncerne la "mildajn teknikojn", kiam ĉi tiuj

povas esti uzataj prefere ol la "malmildaj teknikoj", sur ĉiuj kampoj : energio, industrioj, agrikulturo, medicino kaj kirurgio, ktp ;

42 15a.10e) krei informservojn profite al la laika publiko. Tiuj servoj celos klarigi, laŭ simpla maniero, la certajn avantaĝojn, la eblajn riskojn, la malutilon, la realajn danĝerojn de la elpensoj, eltrovoj, de ties apliko, kaj la apelaciojn, kiujn la publiko povas pretendi ;

43 15a.11e) proponi interparoladojn al la sciencistoj por helpi ilin valorigi sian respekton pri la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO, se ili ne scias aŭ ignoras ĝiajn preskribojn ;

44 15a.12e) submeti al la UNIVERSALA KORTUMO DE JUSTICO la dosierojn pri la sciencistoj ĝenataj pro sia respekto al la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO, por ke la KORTUMO povu defendi ilin, aŭ la dosierojn pri la damaĝoj kaŭzitaj de sciencistoj al la preskriboj de la KODO, malgraŭ la REKOMENDOJ aŭ la DECIDOJ komunikitaj al tiuj sciencistoj ;

45 **Art. 16a.** Koncerne la esplorojn, kiuj antaŭas eventualan eltrovon, ĉiu sciencisto sin devontigas informi unu el la SERVOJ pri ĉiuj konsekvencoj favoraj aŭ/kaj malfavoraj, kiujn li konstatas aŭ konjektas pri siaj aŭ aliaj esploroj, kiujn li povas koni.

## VI. LA UNIVERSALA KORTUMO DE JUSTICO

46 **Art. 17a.** Estas fondita, en la dato de .......... UNIVERSALA KORTUMO DE JUSTICO, ĉi-poste nomita KORTUMO.

47 **Art. 18a.** La KORTUMO estas UNIVERSALA pro tio, ke ĝi povas juĝi ĉiujn malobeojn al la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO, kie ajn konstatitajn.

48 **Art. 19a.** La KORTUMO konsistas el unu plena ĉambro kaj sekciaj ĉambroj koncerne la sciencojn, la industriojn, la individuajn liberecojn, la vivmedion, ktp.

49 **Art. 20a.** La KORTUMO konsistas el konsilantaj nomitaj de la sciencistoj en ĉiu regno, po unu aŭ x konsilanto(j) en en ĉiu sekcio dum .... jaroj. La konsilantoj elektas la prezidanton de la KORTUMO kaj la prezidantojn de la sekcioj, kiuj estas samtempe vicprezidantoj de la KORTUMO.

50 **Art. 21a.** La KORTUMO ricevas ĉiujn honordevoligojn

skribitajn de la sciencistoj en ĉiuj regnoj (vidi ĉi-supre, art. 9a)

51 **Art. 22a.** La KORTUMO publike juĝas la postulojn, kiujn ĝi devas enketi kaj juĝi en limtempo kiel eble plej mallonga, suba al unu jaro. Povas deponi postulon la SUPERNACIAJ SERVOJ PRI REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ, aŭ personoj, aŭ asocioj, aŭ registaroj.

52 **Art. 23a.** Advokato aŭ iu libere elektita persono povas asisti la postulantojn, kiuj restas la mastroj pri sia defendo kaj povas nuligi tiun helpon ĉiumomente.

53 **Art. 24a.** La lingvo praktikata en la KORTUMO estas Esperanto. Traduko esperanta akompanu nacilingvajn postulojn.

54 **Art. 25a.** La KORTUMO publikigas ĉiujn siajn juĝojn.

55 **Art. 26a.** La KORTUMO ne formulas punajn sankciojn, ĉar ĝia kompetento estas morala.

56 **Art. 27a.** La monrimedoj de la KORTUMO estas : kotizoj pagitaj de la sciencistoj kaj asocioj, kontribuaĵoj de registaroj kaj internaciaj instancoj, donacoj kaj enspezoj (vendo de la oficiala ĵurnalo de la KORTUMO, de dokumentoj, bienoj transporteblaj aŭ ne, ktp).

57 **Art. 28a.** La KORTUMO transpagas kvoton el siaj enspezoj al la SUPERNACIAJ SERVOJ PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ.

58 **Art. 29a.** La celo de la KORTUMO, se ĝi estis starigita sekve de adopto de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO, povas etendiĝi al enketo kaj juĝo pri faktoj sen rilatoj kun la scienca deontologio. Tiukaze, ĝiaj konsilantoj decidos, ĉu ili akceptos tiun vastigon de siaj funkcioj, kiu ne malutilu al ilia fundamenta celo. Tiam, ili fiksos la kondiĉojn de tiu vastigo kaj submetos ĝin al la anaro de la tutmonda scienca komunumo, kiu decidos pri tio.

Alvoko diskonigita en la 80.12.18
Ĝisdatigo n° 7 : 84.02.01

Sendinto : koordinatoj
de la PERSONO,
aŭ ŝtampo de la ASOCIO

# ALVOKO AL HOMOJ
## por protekto de la homoj minacitaj per morto aŭ malsanoj imputeblaj al nuklea milito aŭ civila nuklea katastrofo(1)

Al anoj de la medicinaj kaj kuracaj profesioj,
Al estontaj eblaj viktimoj de nuklea milito aŭ de civila nuklea katastrofo,
Al ĉiuj landasocioj, inkluzive tiujn de anoj de la medicinaj kaj kuracaj profesioj

La multiĝo de la nukleaj armiloj pliigas riskon de nuklea milito, kiu neniigos grandan parton de la homaro, meze de suferoj kaj de kanceraj trafoj, kiuj tiam rememorigos al la kompatindaj viktimoj la teruron de Hiroŝimo kaj Nagasako(2)

La multiĝo de la nukleaj instalaĵoj kreas arte faritan radioaktivecon vere gravan, kiu nepri gas, en laŭdire paca tempo, kreskantan radioaktivan nocivon kaj la riskon de civilaj katastrofoj laŭ la tipo de "Three Mile Island".

La nocivo kaj la riskoj imputeblaj al la nuklea industrio estas nedisigeblaj de la nocivo kaj riskoj imputeblaj al genocidoj de Hiroŝimo kaj Nagasako, al provoj de nukleaj bomboj kaj de riskoj de nuklea milito.

Urĝas, ke ĉiuj personoj, ĉar ili suferas la nocivon kaŭzatan de la nuklea industrio normale kaj nenormale funkcianta, kaj ĉar ili estas minacataj per nuklea genocido aŭ per civila nuklea katastrofo, agu persone aŭ kolektive ĉe ĉiuj asocioj, internaciaj kaj naciaj organizoj de kuracistoj kaj anoj de kuracaj profesioj, ĉe ĉiuj, kiuj havas povon en la socio : regantoj; ekonomiaj, religiaj, sindikataj gvidantoj, ktp, kaj ĉe ĉiuj, kiuj povas esti iliaj parolkomisiitoj : amaskomunikiloj, elektitoj, pensuloj, aktivuloj, artistoj, ktp, por ke ĉiuj ekkonu kaj komprenu la gravecon de tiu nocivo kaj de tiuj danĝeroj.

Kuracistoj kaj anoj de kuracaj profesioj, kaj de viaj asocioj, petu al via ministro pri sano vian asignon okaze de nuklea milito aŭ de civila nuklea katastrofo, kaj demandu kiamaniere vi povos precize plenumi la mision, truditan al vi, tamen ĉu vi estas aŭ ne estos al ĝi preparitaj.

Estontaj eblaj viktimoj kaj viaj asocioj, petu la anojn de la medicinaj kaj kuracaj profesioj najbarajn de vi kaj de ties asocioj, precizigi al vi kion ili precize faros por vi, se nuklea milito eksplodos en via lando, aŭ se civila nuklea katastrofo surprizos vian regionon.

**NI AGU ANTAŬ OL ESTOS TRO MALFRUE.**

------------------------------

(1) La legintoj de tiu alvoko povas peti de A.P.J.R. (80 rue des Noyers, Crisenoy, F 77390 VERNEUIL L'ÉTANG) la franclingvan presitan broŝuron : "Immonde Pluton, ceux qui vont mourir te saluent" (Naŭza Plutono, kiuj tuj mortos, tiuj cin salutas), kie kelkaj esencaj argumentoj estas mallonge prezentitaj. Tiu broŝuro, finpresita en la 1a trimestro de '83, kunportas formulon de aprobo.

(2) La Monda Organizaĵo de Sano publikigis en '84 : "Efikoj de la nuklea milito pri la sano kaj la sanservoj".

Alvoko diskonigita en la 82.09.30 — La..............

Ĝisdatigo n° 3 : 83.05.12 — *Subskribo de la sendinto :*

Sendinto : koordinatoj de la PERSONO, aŭ stampo de la ASOCIO

GRUPO "LABORISTOJ"

# Universala grupo de personoj: Laboristoj(1) kaj nelaboristoj, kaj de asocioj(2), kiuj aktivas por starigi deontologion pri laboro(3)

## ALVOKO AL ĈIULANDAJ LABORISTOJ

La aplikoj de iuj sciencoj, interalie de tiuj, kies malkovroj aŭ inventaĵoj servas por pretigi kaj konduki militojn, sciigas nin, laŭ maniero de nun nekontestebla, ke ĉiuj civilizacioj estas fragilaj, kaj riskas esti ekstermitaj, i.a. per armiloj nukleaj, aŭ kemiaj aŭ biologiaj, aŭ per kombino intenca aŭ ne, de du el tiuj armiloj, aŭ de la tri (4).

Se tiu milito, intenca aŭ ne, subite iam okazus, ĉu la postvivuloj, en la landoj kie ili vivtenus, povus serĉi la respondeculojn, persekuti ilin, por ke ili estu punitaj proporcie al la grandegaj suferoj kaj detruoj, kiujn ili kaŭzis persone, aŭ laŭordone, aŭ per sia laboro ? Kaj eĉ, ĉu ne necesus timi, ke la postvivuloj, obstinegaj pro doloro, sin venĝos al senkulpuloj, kun blindeco egala al tiu, kiu ordonis la murdon de la vivuloj ?

Ĉu la homoj, kiuj, en ĉiuj landoj, sentas sin koncernataj pro tiu ebla estonteco de nenombreblaj mortintoj, mortontoj, de doloroj kaj malamoj, ne devus klopodi scii, ĉu la punaj kodoj de ilia lando permesas juĝi alinacianojn ? Ĉu dua "Proceso de Nurenbergo", se ĝi povus okazi, kvietigus la ondon de tiuj malamoj ? Ĉu ne necesas, konsekvence, krei UNIVERSALAN KORTUMON DE JUSTICO, disponeblan por individuoj samkiel por nacioj, antaŭe agnoskitan de la homoj - se ne de regantoj - por juĝi militkrimojn, genocidon, homaricidon, kaj ilian preparadon ?

Ĉu la postvivuloj permesus, ke la respondulоj, en ĉiuj niveloj, pretendu pro la obeo al donitaj ordonoj, pro la neretroaktiveco de la leĝoj aŭ pro ties neaplikeblo kaŭzita de manko - intenca aŭ ne - de aplikdekretoj aŭ cirkuleroj, pro laborrajto aŭ -neceso ?

La perspektivo de tiu milito, agnoskita de la registaroj en multnombraj landoj, instigas la subskribintojn de la nuna alvoko deziri, ke reguloj de deontologio estu fonditaj por la labormondo, en ĉiuj ĝiaj niveloj. Ja ekzistas, interalie en Francio, kodo pri medicina deontologio, kaj personoj kaj asocioj ĵus fondis grupon por peti starigon de kodo pri scienca deontologio (5). La akcepto de tiuj reguloj, fare de la laboristoj kaj ties sindikatoj donus al laboro novan dimension, ĉar moralan kaj universalan pro tio, ke la laboristoj fariĝus respondulo pri la vivo kaj postvivo de ĉiuj vivaĵoj, laboristoj kaj ne-laboristoj. Tiuj reguloj de deontologio pri laboro, ellaborigotaj, kondukus al starigo de UNIVERSALA KODO DE DEONTOLOGIO PRI LABORO.

Potencaj nacioj, iliaj satelitoj kaj aliancanoj, partoprenas jam de jaroj en armil-konkuro tiel danĝera, obstinega, ĝeneraligita, ke ni ĉiuj devas nin demandi, ĉu ĉiu el ni ne havas jam sian parton, eĉ malgravan, senperan aŭ plej ofte peran, en tiu prirespondeco, kaj ĉu ni ne devas postuli, ke oni respektu nian individuan ekkonscion kaj komprenu nian rifuzon dividi tiun prirespondecon pri proksimiĝo de genocido.

Tiuj reguloj de deontologio do konfirmus, por ĉiuj laboristoj ilian ekkonscion nepran kaj nediskuteblan ĉar moralan, pri rifuzo fabriki armilojn nukleajn, kemiajn, biologiajn, pecojn, brulaĵojn, produktojn aŭ venenojn, kiuj eniras en la konsiston de tiuj armiloj, iliajn sendilojn, ilian tutan loĝistikan ekipaĵon. La starigo de tiuj reguloj permesus konstati, ĉu la deklarita pacismo de sindikatestroj aŭ politikestroj estas reala aŭ parola. Reala, ĝi devus esprimiĝi per sindikataj decidoj, kiuj agnoskus la unuaecon de la vivrespekto, per leĝproponoj kaj leĝoj celantaj malarmadon. Konstatante la vanecon de realigo de generala malarmado, homoj pli kaj pli konsciaj, ke solaj, aranĝoj unuflankaj, progresivaj kaj kontrolataj pri malarmado, kreos la necesegan dinamikon pri la paco, kiu tiel pravigos la DEONTOLOGION PRI LABORO (6).

Se aperas evidente, ke la laboristoj ne aŭ ne plu devus labori por elpensi kaj produkti armilojn por amasa detruo, kiuj ekstermus gravajn kvantojn da laboristoj (kaj da ne-laboristoj), necesus akcepti ankaŭ, ke la laboristoj povu, konscience, en iu aŭ alia momento de sia kariero voli ne plu plenumi sian laboron, kiun ili juĝus neakordigebla kun la nova opinio, kiun ili ekhavus pri la respekto al la vivo, ĝenerale, senprokraste aŭ ne, aŭ speciale al tiu de iliaj laborkamaradoj, aŭ al

tiu de ilia familio, aŭ eĉ sole al sia propra vivo, sen tio, ke la manifestado de tiu volo neprigu por ili profesian sankcion neakceptindan (maldungon, ekzemple)(7). La reguloj de DEONTOLOGIO PRI LABORO do devus inkluzivi "konsciencklaŭzon", kies eblaj motivoj estus fiksitaj laŭ la profesioj, ties malutilo kaj ties danĝeroj por la laboristoj kaj/aŭ por ĉiuj, kiuj suferus iliajn efikojn, senprokraste aŭ ne.

Atendante, ke tiuj reguloj de DEONTOLOGIO PRI LABORO estu establitaj, la subskribintoj de tiu ĉi alvoko deziras, ke la laboristoj debatu pri tio inter si kaj per ĉiuj komunikebloj, kiujn ili povas disponi : kunvenoj, sindikataj bultenoj, klopodoj, manifestacioj, sindikatoj, politikaj partioj, amaskomunikiloj, ke ili akiru la prikonsideron de tiu problemo fare de sia sindikato, kaj ke ili mem kaj ilia sindikato aliĝu al nia "Grupo LABORISTOJ", kiu establos projekton pri tiuj reguloj de DEONTOLOGIO PRI LABORO.

---

(1) Ni donas al vorto "Laboristoj" ĝian difinon la plej larĝan : tio estas viroj aŭ virinoj, kiuj kontribuas por salajro aŭ bonvole, direkti, enkadrigi aŭ efektivigi fizikan aŭ intelektan laboron, praktiki kian ajn aktivecon moralan, kultan, klerigan, ktp.

(2) Pri asocioj, ni komprenas ĉi tie ĉiuspecajn grupojn de personoj : asocioj, kooperativoj, sindikatoj, ktp, deklaritajn aŭ ne, strukturitajn aŭ senformajn, kiuj zorgas nur, aŭ precipe, aŭ akcesore pri moralaj problemoj de la laboro.

(3) Deontologio pri laboro : regularo, kiu fiksas la moralajn devojn de la laboristoj inter ili, vid-al-vide al iliaj dungitoj aŭ dungintoj, kaj de tiuj, konataj aŭ ne, kiuj suferas aŭ suferos la efikojn de ilia laboro, tuje aŭ ne.

(4) Legi la verkon : "La armiloj por masiva detruo kaj la franca politiko de defendo", bulteno P.J.R. n° 79/80, 4a trimestro de 1979 (franclingve), de Y. Le Hénaff.

(5) Universala grupiĝo de personoj kaj asocioj aktivantaj por starigi universalan kodon pri scienca deontologio, supernaciajn servojn de sciencaj rekomendoj kaj decidoj, kaj universalan kortumon (dokumento disponebla ĉe la A.P.J.R.).

(6) La Pacista Unio de Francio (4 rue Hoche, F 92100 BOULOGNE) animas en Francio la kampanjon por unuflanka malarmado.

(7) Vidi la "Proponon celantan respektigi liberon kaj konsciencon de ĉiuj, kiuj volas ne plu labori depende de jonigantaj radiadoj", prezentitan de APJR en '78, franclingve disponeblan ĉe APJR, k ĉi-poste aldonitan.

Alvoko diskonigita en la 82.08.30 — La...............

Ĝisdatigo n° 4 : 83.06.28 — Subskribo de la sendinto :

# PROJEKTO PRI REGULOJ DE DEONTOLOGIO PRI LABORO

## 1. DIFINOJ

1* **Laboro** : ĉiu homa agado, salajrata aŭ ne, memvola aŭ trudita.

2 **Laboristoj** : ĉiuj personoj, kiuj kontribuas, kontraŭ salajro aŭ memvole, direkti, enkadrigi aŭ efektivigi laboron fizikan aŭ intelektan, praktiki ian ajn agadon moralan, klerigan, kultan, ludan, ktp.

3 **Organizo de laboristoj** : ĝenerale, la laboristaj organizoj celas esence ĝis nun defendon de la materiaj interesoj de siaj komisiintoj, la moralaj konsideroj - eĉ se atentataj - intervenas nur akcesore por tiu defendo. La nuna projekto volas, ke tiuj moralaj konsideroj unuarange intervenu en la organizadon de la laboristoj. Respektante tiujn, kiuj sin tenas je la materialista difino de tiu organizo, tiu, kiun ni sugestas estas jena : ĉiu kolektivo de personoj, kiu defendas la moralajn aŭ moralajn kaj materiajn interesojn de laboristoj, submetante tiujn interesojn al la observado de reguloj de deontologio pri laboro; entreprenestroj kaj kadroj sin konsideras ĉi tie kiel laboristojn, kiuj akceptas apliki tiujn regulojn de deontologio pri laboro. Eventuale, tia organizo de laboristoj povas direkti aŭ administri la entreprenon, en kiu ili laboras.

4 **Deontologio pri laboro** : Tuto de la reguloj, kiuj fiksas la moralajn devojn de laboristoj inter ili kaj de ĉiuj, konataj aŭ ne, kiuj suferas aŭ suferos la efikojn nocajn aŭ/kaj danĝerajn - aŭ kiuj sin malkovros tiaj - de sia laboro, tuj aŭ poste.

## 2. ESENCAJ PRINCIPOJ

5 Ĉiu laboristo respektas ĉiujn homojn. Li akceptas, ke la homoj havas aliajn kredojn, kutimojn, lingvojn aŭ dialektojn, agmanierojn ol la liajn. Se li klopodas konvinki ilin pri la praveco de siaj propraj kredoj, ideoj, ktp, li rifuzas trudi ilin al ili per forto aŭ hipokriteco.

6 Ĉiu laboristo respektas ĉiujn homojn en ilia estonteco. Do li malpermesas al si ĉiun agadon, kiu povus malutili la estontajn generaciojn.

7 Ĉiu laboristo, solidara de ĉiuj homoj, devas apliki en

---

* La alineoj estas numeritaj por faciligi la transporton de viaj rimarkoj.

sia laboro la principojn de vero, verdiremo, justeco, interhelpo kaj bonvolemo.

### 3. REGULOJ DE DEONTOLOGIO PRI LABORO

8 Neniu laboristo povas esti devigata fare de lerneja orientigo, universitata aŭ teknologia specialigado, aliĝo al profesia kategorio, plenumi laboron neakordigeblan kun siaj moralaj konvinkoj.

9 Ĉiu laboristo estas libera aliĝi al libere elektita organizo de laboristoj.

10 Ĉiu organizo de laboristoj servas siajn komisiintojn, kiuj ne servas ĝin. Ĝi disponas nenian privilegion, kiu ebligus limigi ilian opiniliberon, la sendependon de ilia ago kaj la striktan memstarecon de ilia profesia aŭ privata vivo.

11 Organizo de laboristoj estas libera havi nur materialistajn celojn en rekta rilato kun iu profesio aŭ iu grupo de precizaj profesioj. Ĝiaj statutoj devas tiam indiki tiun memvolan limigon de siaj celoj. Ĝi devas informi pri tio la kandidatojn al aliĝo. Siaflanke, la laboristoj, en sia aliĝpeto, devas agnoski, ke la organizo, al kiu ili deziras aliĝi, persiste havas nur strikte materiajn celojn.

12 Ili devos krome subskribi deklarojn de moraleco apartajn laŭ sia profesio : ekzemple, laboristo (entreprenestro, kadro, laboristo) de armiluzino devos agnoski :

a) ke li opinias, ke la armiloj povas esti uzataj por la defendo de homa grupo;
b) ke armiloj uzataj de homa grupo povas havi detruan rezultaton, kiu superas la defendbezonojn kaj ĉiujn homajn konjektojn;
c) ke tiaj armiloj povas esti uzataj prevente kaj kontraŭ civilaj loĝantaroj.

13 Organizo de laboristoj povas havi, krom siaj strikte materiaj celoj kaj super ili, celojn de homama protekto, pravigitajn pro la minacoj de genocido, kiuj pezas sur la homoj. Ĝiaj statutoj devas tiam indiki tiun vastigon de tiuj celoj al ĉiuj kandidatoj al aliĝo. La aparteno al organizo de laboristoj donas rajtojn kaj trudas devojn : se ĝiaj celoj plivastiĝas trans la kadron strikte materian, rajtoj kaj devoj sin trovos pliigitaj, kaj por la organizo, kaj por ĝiaj anoj.

14 La laboristoj, en sia deklaro de aliĝo al tia organizo

de laboristoj, devas do agnoski, ke ĉi-lasta havas homamajn kaj defendajn celojn rilate iliajn materiajn interesojn. Ili devos eventuale subskribi aldonan deklaron pri moraleco. Ekzemple, inĝeniero devos skribe agnoski, ke li malpermesas al si ĉiun esploradon pri la bombo kun neŭtronoj.

15 Ĉiu laboristo povas en ĉiu momento de sia kariero sin apogi sur "KONSCIENCA KLAŬZO" permesanta rifuzi laboron, kiun li plenumis ĝis nun, sed pri kiu li nun komprenas la malutilojn kaj/aŭ la riskojn por la homoj, ĝenerale, nun aŭ estonte, aŭ por sia familio, aŭ por siaj laborkamaradoj, aŭ por si sola. La motivoj pri akcepto de la "konscienca klaŭzo" estos fiksitaj laŭregule de egaleca komisiono laŭ la profesioj, la malutiloj kaj la riskoj eventuale propraj al tia sektoro de la konsiderata profesio. La apliko de tiu klaŭzo ne devas neprigi por la plendanto gravan profesian sankcion, kiel la fordungon, sed tujan reklasigon laŭ la plej bonaj ebloj.

16 La organizo de laboristoj, kiun ni deziras, praktikos en ĉiuj okazoj la demokratian regulon de la sekreta voĉdono. Kiam tiu organizo kunekzistos en entrepreno kun unu aŭ pluraj aliaj organizoj de laboristoj, reprezentantoj de ĉiuj tiuj organizoj kontrolos la komunajn sekretajn voĉdonojn.

17 Deontologio pri laboro trudas koni la veron rilate la plenumatajn laborojn kaj ties proksimajn aŭ malproksimajn rezultatojn. Tiu neceso trudas la nuligon de ĉiuspecaj sekretoj. La laboristoj rajtas postuli tiun veron kaj ĝin ricevi.

18 Ĉiu atenco al la deontologio pri laboro fare de laboristo aŭ organizo de laboristoj povas okazigi apelacion.

19 Konfederacio, kiu havus nur celojn pri defendo de materiaj interesoj, ne povus enlasi nacian sindikaton, kiu havus celojn homamajn kaj materiajn. Same, nacia sindikato, kiu havus nur celojn pri defendo de materiaj interesoj, ne povus enlasi lokan sindikaton, kiu havus celojn homamajn kaj materiajn.

20 Inverse, lokaj sindikatoj, kiuj havus celojn homamajn kaj materiajn, ne povus krei lokan unuiĝon kun aliaj lokaj sindikatoj, kiuj havus nur materiajn celojn kaj naciaj sindikatoj, kiuj havus celojn homamajn kaj materiajn, ne povus krei konfederacion kun naciaj sindikatoj, kiuj celus nuran defendon de materiaj interesoj de

la sindikatanoj.

21 Tiu disigo inter laboristaj organizoj homamaj-profesiaj, kaj nur profesiaj, pravigita pro la graveco de la nuklea minaco, evidente ne malpermesas interrilatojn de bonkora najbareco.

Alvoko diskonigita en la 82. 08.30
Ĝisdatigo nº 3 : 83.09.19

# ALDONO

## Propono celanta respektigi liberon kaj konsciencon de ĉiuj, kiuj volas ne plu labori depende de jonigantaj radiadoj

De post la kreo de nia asocio en 1962, ĝiaj aliĝintoj, en niaj tiamaj ĝeneralaj asembleoj, adoptis proponojn cele al protekto kontraŭ nocivo kaj danĝeroj de jonigantaj radiadoj, kaj ili plibonigis ties redaktaĵon.

Anoj de A.P.J.R. kontraŭas la nuklean industrion kaj ili klopodas informi kaj konvinki aliulojn pri la realeco kaj graveco de tiuj nocivo kaj danĝeroj.

Ĵuse, la kazoj de du aliĝantoj komprenigas al ni la situacion de ĉiuj al kiuj oni trudas kontraŭ ilia volo laboron en medio poluciata aŭ poluciebla fare de radioaktivaj izotopoj. Unu estis surradiita kiel daŭra laboristo en nuklea entrepreno, alia eble estis surradiita kaj riskis esti tia kiel laboristo en nenuklea entrepreno, kaj ambaŭ ekkonsciis pri la nocivo kaj danĝeroj de jonigantaj radiadoj nur laborinte en medio radioaktive poluciata.

Tiu ekkonscio kondukis ilin elpaŝi por provi respektigi sian laborliberon, la protekton de sia sano, la subtenon, kiun ilia laboro portas al ilia familio, kaj sian konsciencon pri la nocivo kaj danĝeroj de la jonigantaj radiadoj.

Tial mi prezentis novan proponon al ekzameno kaj voĉdono de la APJR-anoj. Kalkulinte kun iliaj rimarkoj, la sekvanta propono estis adoptita dum la Ĝenerala Asembleo, en Rubezo la 8an de oktobro 1978. Tiu adopto ne entenas nian rekonon pri la utileco de la nuklea industrio, sed la necesecon protekti ĉiujn, kiuj kontraŭvole suferas ĝiajn nocajn efikojn, kaj la amikecon, kiun ni sentas por ĉiuj homoj.

**Nova Propono 21a.** La APJR PROPONAS, ke la leĝaro kaj la labororganizado en ĉiuj instaloj kaj industrio, nukleaj aŭ uzantaj radiadojn elektromagnetajn (IKS kaj gama) aŭ partiklajn (alfa, beta, neŭtronika, ktp) estu plibonigitaj por ke estu respektataj la **libero** kaj la **konscio** de laboristoj :

1. ke ĉiuj laboristoj, kiuj kutime aŭ okaze laboras sub jonigantaj radiadoj, ricevu antaŭ ĉiu laboro, kaj en sia gepatra lingvo, klaran kaj kompletan instrukcion pri la nocivo kaj la danĝeroj de la jonigantaj radiadoj, ĝenerale kaj en la kadro de sia persona laboro, koncerne la teknikojn de radiologia protekto nepre aplikendaj, koncerne la legadon de la krajonodozometro, kiun ĉiu devas porti, kaj koncerne la

komprenon pri la rezultoj de sia dozometrio, komparotaj kun la leĝaj maksimumaj akcepteblaj dozoj;

2. ke la laboristoj sub jonigantaj radiadoj de industrioj, esplorcentroj, laboratorioj, medicinaj establoj, specife nukleaj aŭ uzantaj radiadojn elektromagnetajn aŭ partiklajn, povu pretendi pro "**konsciencklaŭzo**" pravigita de unu aŭ pluraj el la sekvantaj motivoj : protekto de sia persona sano, protekto kontraŭ la genetika risko, malkonsento partopreni per sia laboro en la pligrandigo de la nocivo kaj riskoj imputeblaj al jonigantaj radiadoj. Uzo de tiu "**konscienco-klaŭzo**" permesus al ili ĉesigi provizore aŭ definitive sian laboron sub jonigantaj radiadoj, sen ke tiu malkonsento povu esti konsiderata de iliaj oficestroj kiel unuaflanka rompo de sia laborkontrakto (skriba aŭ ne), kaj tiam esti vokitaj labori en okupoj ne radiriskaj de sia entrepreno aŭ establo ;

3. ke la okupoj sen skriba kontrakto, ke la skribaj laborkontraktoj, ke la aliro al profesia sekreto koncerne tiun laboron, estu proponitaj al ĉiuj laboristoj nur post klarigo pri iliaj biologiaj efikoj, por unujara daŭro, renovigeblaj skribe ĉiujare, sub la limiga kondiĉo, ke la plej freŝdata regularo koncerne la sekurecon de la laboro sub jonigantaj radiadoj estu rememorigita ĉiujare sur tiu skribo komplete kaj kompreneble por ĉiuj laboristoj (en ilia nacilingvo por la fremdaj laboristoj);

4. ke la laboristoj en entreprenoj specialigitaj aŭ de nedaŭra laboro, eksteraj al instaloj kaj industrioj kiujn celas tiu ĉi propono, kaj kiuj laboras tie okaze, povu ĉiumomente **rifuzi labori sub jonigantaj radiadoj**, sen esti iel punitaj de siaj precipaj oficestroj;

5. ke la dosieroj pri surradiado de ĉiuj koncernaj laboristoj estu rekonitaj kiel ilia persona proprietaĵo, la laboristoj nepre prezentu ilin al medicinaj oficoj por la ĝisdatigoj, kaj la medicinaj oficoj povu evidente kopii ilin ;

ke troviĝu en tiu dosiero laŭ maniero klare formulita kaj detala

- la gama-dozometrio kalkulita per la filmoj-dozometroj,

- la dozometrio taksita kaj kalkulita laŭ la neŭtronaj radiadoj koncerne ĉiun intervenon sub tiuj radiadoj,
- la antropogamametraj kontroloj en la kazoj de akcidento pro infekto per enspiro aŭ enstomakigo,
- ĉiuj analizoj kaj kontroloj de la sekrecioj, kiuj povas utile informi la dosieron (sanga formulo, beta-kontrolo de la urinoj, ktp),
- ke la M.A.D. (Maksimuma Akceptebla Dozo) leĝa estu konsiderata de la labordonanto kiel limo nur escepte alproksimigota (transe, li devas fari deklaron ĉe la laborinspekto), kaj ĉiuokaze ke la laboristoj estu neniam sisteme utiligataj ĝis sorbado de tiu M.A.D.,
- ke la leĝaro pri M.A.D. estu reviziita, kaj ke estu rezignita la ideo de sojlo sub kiu nenia noco ekzistus;

6. ke la laborkuracistoj estu senpere komisiitaj kaj pri kontrolo de la krajono-dozometroj, kaj pri legado de la rezultoj pri iliaj dozometrioj, kies donitaĵojn ili komunikos kaj komentos al koncernaj laboristoj, samtempe kiam ili transskribos ilin sur iliaj dosieroj pri surradiado.

Ĝisdatigo n° 4 : 78.12.23

La APJR-anoj, deziras, ke la koncernaj laboristoj petu de siaj respektivaj sindikatoj ilian pozicion kaj iliajn postulojn pri tiu objekto, kaj ke la legantoj nerekte koncernataj pri tiu problemo bonvolu transsendi tiun proponon al siaj intereseblaj amikoj.

Kore,

La Prezidanto-fondinto de APJR (en 62),
Direktoro (de 62) de la bulteno P.J.R.
Johano PINJERO

# PROJEKTO DE UNIVERSALA ASOCIO POR LA ANTAŬENIGO DE LA INDIVIDUAJ LIBEROJ (U.A.A.I.L.)

## I. ANTAŬPAROLO

1* En ĉiuj homaj socioj oni proklamas, opinias, scias aŭ diras, ke ĉiuj homoj profitas liberojn, sen precizigi, ĉu temas pri la individuaj liberoj, pri ĉiuj aŭ pri nur iuj inter ili kaj eĉ se tiuj individuaj liberoj estas nur la privilegioj, kiujn ĝuas nur iuj anoj de tiuj socioj.

2 Liberoj, ĝojoj de tiuj, kiuj povas agi, ĉar ili estas inteligentaj aŭ potencaj, sed ankaŭ deziro de tiuj, kiuj volus agi, sed ankoraŭ trompitaj esperoj de tiuj, kiuj, pro diversaj kialoj, ne povas agi : infanoj briditaj de sia patro; junaj viroj kaj virinoj briditaj de la homamaso de tiuj, kiuj posedas peceton da libero kaj kiuj, oftege, prave timas perdi ĝin (ekzemple : la libero labori); malriĉuloj senpovaj pro sia malriĉeco; civitanoj konsiderataj kiel neplenaĝaj de la hierarkiaj socioj; malsanuloj kaj malsatuloj, kiuj alkroĉiĝas al la plej mizera libero vivi.

3 Ĉar registaro, kiu ajn estu, asignas al si komision firmteni unuecon de la **socio** kaj kunordigi la diversajn formojn de vivo, kiujn tiu socio ebligas, ni ĉiuj devas agnoski, ke ĉiu registaro estas "**socialista**", kia ajn estu ĝia nomo.

4 Tamen, tiu termino "socialista" devas esti precizigita pro du kialoj :

5 a) unue, ĉar la socialistaj sistemoj estas diversegaj, eĉ kontraŭaj en siaj teoriaj konstruoj : socialismoj ŝtata, kolektivista, monarkista, respublika, nacia, agrara, prudona, fabiana, teokratia, ktp;

6 b) poste, ĉar la politikaj sistemoj laŭdire "socialistaj" nun ekzistantaj en la mondo estas fakte fremdaj al la individua volo de justeco, de egaleco kaj de interhelpo, kiu estas la ekzistokialo de la teoria socialismo. Do oni povas nur erari pri la socialismo, se oni komprenas ĝin, prenante kiel ekzemplon aŭ modelon nur unu el tiuj strukturoj.

* ... por faciligi la transporton de viaj rimarkoj.

7 Do oni povas difini la diversajn nunajn politikajn reĝimojn "socialistajn", ĉar ili volas neprigi la progreson de la homaj grupoj, enkorpigante laboron, inventemon, riĉecon kaj diversajn havaĵojn produktitajn en tiu socio, al la entuta komunumo. Sed ĉu tiuj grupoj servas la individuojn, kiuj konsistigas ilin, ĉu ili volas servi ilin, ĉu ili fordonas sin al unika komisio servi ilin ? Aŭ ĉu la individuoj ekzistas nur por pravigi la vivon de grupoj, kiuj absorbas la plej bonon de la "progreso" ?

8 Ekzistas reale nur du manieroj regi la sociojn :

9 a) aŭ, se oni akceptas, ke la registaro konsistas el personoj plialtigitaj pro sia scio, sia singardo kaj sia digno super la civitanoj, kiujn ili regas. Tiamaniere, la aŭtoritato de tiu registaro estas samtempe necesega kaj bonfara. Tiu aŭtoritato rezultas de nenia konkreta realeco sed de abstrakta aŭ teoria principo : la Tradicio, la Demokratio, la Popolo, la Historio, la Partio, la Nacio, ktp. Ĝi povas dependi de diigita individuo : la Patreto, la Mastro de la popoloj, la Patro de la popoloj, la "Führer", la "Duce", la Granda Stiristo, la Profeto, la Elektito de Dio, la Superega Batalanto, la Ajatolao, ktp.

10 b) aŭ, se oni akceptas aŭ volas, ke la regantoj ne distingu sin de la regatoj per apartaj majstraj kvalitoj. Tiaokaze, la regantoj estas elektitaj de la komuna opinio, kies esprimo estas la libera batalo garantiata per diversaj reprezentaj rimedoj. Tiukaze, regi signifas preni la oportunajn decidojn, kiuj koncernas la vivmanieron kaj la kunlaboron de personoj egalaj pri rajtoj. La decidoj estas prenitaj sub ĉies kontrolo dank'al la libero de informo kaj de opinioj.

11 Kun tiu dua maniero regi la civitanojn, oni povas kompari, sur la familia tereno, aŭ la aŭtoritaton de patro, kiu akceptas dividi ĝin tute kun siaj infanoj, ĉar li komprenas la lecionon de ilia deziro pri libereco, aŭ la aŭtoritaton de infanoj, de gejunuloj, kiuj rifuzas, ke ilia patro manifestu aŭtoritaton superan al la ilia, kio ne malpermesas akcepti la lecionojn de lia sperto.

12 Ekzistas probable ankoraŭ kelkaj triboj de liberaj homoj, kiuj vivas en lokoj privilegiaj pro la klimato, la abundo de la natura provianto, la natura respekto de la aliuloj, la simpleco de la vivo. Sed la homoj, en sia grandega pli-

multo, uzas nur liberojn partajn, nombre variigeblajn laŭ la landoj, ĉar la socialismo prezentas naturan inklinon al patronismo, ĉi tie politika esprimo de la netoleremo, kaj ĉar la vivo en gravaj grupoj trudas limigojn al la uzado de la liberoj.

13 La demando, kiun ni metas al ni estas do : ĉu tiuj limigoj estas pravigitaj, akcepteblaj, akceptitaj de ambaŭ kontraŭuloj : tiu, kiu limigas la liberojn; tiu, kiu eltenas tiujn limigojn ? Tiu demando estas metita sub diversaj formoj tutlonge de la homa vivo : kiuj estas la pravigoj realaj, validaj aŭ troaj de la puno aplikita al kolegiano, de punoj registritaj en la kodoj, de la propatria mortodevo ?

## II. CELOJ DE U.A.A.T.L.

### A. KOMENTO

14 La UAAIL grupigas en siaj sekcioj PERSONOJN kaj ASOCIOJN, kiuj nur libere aliĝas al ĝi.

15 Ĝia esenca celo estas permesi al ĉiu taksi sian propran vivon surbaze de liberoj, kaj tiun de aliuloj - eĉ de niaj parencoj - sur tiu sama bazo de libero, instigi la aliulojn pripensi la kondiĉojn de siaj liberoj, mezuri ilin, postuli ilin, se ili opinias pravigita tiun postulon, kompreni, akcepti aŭ rifuzi ties limigojn.

16 La UAAIL do volas doni al ĉiulandaj individuoj, eventuale grupiĝintaj en asocioj, la okazon scii :

17 a) ĉu ili volas esti liberaj;

18 b) kiel ili konsideras sian kunlaboradon kun la aliaj individuoj de sia socio, por ke ĉiuj estu egale liberaj;

19 c) kiel ili konsideras la kunekzistadon de siaj individuaj liberoj kun la aŭtoritato kaj potenco de sia registaro;

20 d) kiel ili komprenas kaj organizas la kunekzistadon de siaj individuaj liberoj kun tiuj de estuloj, laŭ iu aŭ alia maniero subaj al ili : siaj infanoj, siaj lernantoj, siaj laboristoj kaj oficistoj, siaj regatoj.

21 En iuj ŝtatoj, la registara propagando, apogata per la amaskomunikiloj, instigas la ŝtatanojn de la koncernaj ŝtatoj kredi, ke ili estas la plej liberaj homoj en la

mondo. La regantoj tiel flatas la regatojn por igi ilin pli obeemaj. Por kontroli la eventualan pravecon pri tiuj kredoj, la anoj de UAAIL opinias, ke ilia esenca kaj simplega tasko estas kaj estos kompari kiamaniere la individuoj uzas ĉiujn liberojn en ĉiuj landoj. Ekzemple en via lando, ĉu via libero migri interne kaj ekstere de ĝiaj landlimoj estas reala, kompleta aŭ limigita ? Kaj kiuj pravigoj estas donitaj por la starigo de tiuj limigoj ?

22 Tiu esplorado de la liberoj estas farita laŭ justeca kaj frateca spirito al ĉiuj, kiuj disponas malpli da liberoj, postuli la disponigon de la liberoj, kiujn ili ĝuas ne plene, aŭ ne tiom, kiom la plej liberaj homoj.

B. STATUTO DE U.A.A.I.L.

23 **Paragrafo 1a.** La UAAIL estas universala asocio, kies anoj - kiaj ajn estas iliaj raso, nacieco, kredoj, lingvo aù dialekto, socia situacio - klopodas koni kaj diskonigi al ĉiuj homoj, antaùenigi la liberojn de individuoj izole konsiderataj.

24 **Par. 2a.** La UAAIL enhavas sekciojn de anoj, kiuj grupiĝas laŭ siaj anoj kaj la ebloj establi tiujn sekciojn.

25 Anoj de UAAIL povas, laŭplaĉe, aliĝi al sekcio aŭ rekte al UAAIL.

26 **Par. 3a.** La celoj de UAAIL-anoj estas nur praktikaj. Ili konsistas :

27 3.1. establi kaj ĝisdatigi liston de la individuaj liberoj praktikataj en ĉiuj landoj, iam kaj nun: esencaj, precipaj kaj akcesoraj liberoj, ekzemple libero manifesti sian kredon aŭ nekredon, agi, alilokiĝi;

28 3.2. establi tiun liston per diversaj manieroj, ekzemple laŭ la diversaj praktikaj aspektoj de la vivo: loĝado, nutrado, kuracado, laboro, translokiĝo; poste sociaj : naskiĝo, familia vivo, eduko, instruado, profesia vivo, geedza vivo, maljuniĝo, morto; poste moralaj : opinioj, esprimo, toleremo legado, informo, klarigo, arta vivo, doktrinoj moralaj, religiaj, filozofiaj;

29 3.3. esplori, por ĉiu libero, kion ĉiu homo povas fari kaj kion li povas rifuzi fari, surbaze de sia rajto kaj de rajto de aliaj individuoj praktiki tiun liberon kaj aliajn liberojn;

30 3.4. establi kaj ĝisdatigi liston de rimedoj agnoskitaj en la diversaj landoj por praktiki la individuajn liberojn, kaj de rimedoj, kiuj permesas la limigon de tiuj liberoj;

31 3.5. publikigi tiun liston de la individuaj liberoj kaj rimedoj por praktiki ilin, kaj diskonigi ĝin tutmonde;

32 3.6. kontroli, ĉu la universalaj deklaroj de homrajtoj, de infanrajtoj,..., la apartaj ĉartoj : de malsanulo, ......, inkluzivas la uzadon de individuaj liberoj, kaj estas adoptitaj en la diversaj landoj, kaj ĉu tiu adopto estas konkretigita per leĝoj aplikeblaj kaj aplikataj;

33 3.7. peti ĉiun gvidanton, registon aŭ instanc-direktanton de ĉiu lando :

34 3.7.1. efektivigi per aktoj leĝodonaj aŭ/kaj reglamentaj la individuajn liberojn agnoskitajn en la konstitucio de sia lando kaj en rajtodeklaroj kaj ĉartoj, kiujn ŝtatanoj ne aŭ ankoraŭ ne uzas malgraŭ tio, ke ili estas leĝe agnoskitaj;

35 3.7.2. enskribi en leĝoj kaj/aŭ apliki ĝenerale aŭ en precizaj kazoj la individuajn liberojn praktikatajn pli en aliaj landoj ol en la propra.

36 **Par. 4a.** Ĉar la UAAIL celas konsciigi la individuojn pri la reala amplekso de sia rajto al liberoj, rezultos de ĝia pligrandigo, eĉ nur en mondparto, ke, en tiu parto, ĝi malpezigos la rimarkindan mision de la asocioj, kies anoj batalas por la defendo de subprematoj : kvara-aŭ triamondistaj asocioj; Amnestio Internacia; ligoj pri homrajtoj, infanrajtoj; Kuracistoj sen landlimoj, ktp.

## C. RIMEDOJ DE U.A.A.I.L.

37 **Par. 5a.** Kotizo ne estu fiksita por aparteno al la UAAIL aŭ al unu el ĝiaj sekcioj, kiuj ricevos nur donacojn regule konstatatajn, kies karaktero eventuale anonima devos esti respektata. Tamen, kotizo povos esti fiksita en landoj, kie la priasocia leĝaro malpermesas la pagon de donacoj.

38 **Par. 6a.** La UAAIL kaj ĝiaj sekcioj konsistigas laŭplaĉe asociojn deklaritajn aŭ ne, laŭ la leĝaro de la lando, kie ĉiu havas sian sidejon.

39 **Par. 7a.** La UAAIL-anoj uzas la nacia(j)n aŭ etna(j)n lingvo(j)n aŭ la dialekto(j)n inter si, kaj en siaj rilatoj kun alilandaj UAAIL-anoj, kie estas parolata(j) tiu(j) lingvo(j) aŭ dialekto(j). Por aliaj interlingvaj rilatoj, esperanto estas rekomendita.

Alvoko diskonigita en la 82.12.24 — La............

Ĝisdatigo n° 4 : 84.01.22 — Por UAAIL aŭ la sekcio :

Sendinto : koordinatoj
de la PERSONO,
aŭ stampo de la ASOCIO

Grupo

**KODO**
**DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO**

Universala grupo
de personoj kaj asocioj
aktivantaj por starigi
kodon
de komunika deontologio

# PROJEKTO PRI KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO

## A. PREZENTO

### I. DIFINOJ

1* En la projekto ĉi tie prezentita de KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO, konvenas tute komence rekoni kaj difini ĝiajn precipajn protagonistojn kaj la rezulton de ties rilatoj.

2 Ni distingas tri protagonistojn : la PETANTON, kiu petas komunikadon. Tiu petanto povas sin turni aŭ al PERANTO, aŭ al AMASKOMUNIKILO, aŭ al peranto kaj amaskomunikilo.

3 La petita peranto enketas pri la peto kaj povas eventuale peti la helpon de amaskomunikilo(j).

4 Ekzemploj : se vi skribas persone al via deputito, al ministro, ĵurnalisto, ktp, tiuj personoj fariĝas viaj perantoj.

5 Ĉar la ĴURNALISTOJ estas la plej konataj perantoj, konvenas doni nian difinon pri ili.

6 La petita amaskomunikilo ekzamenas siaflanke la peton kaj ĝi povas same peti la helpon de peranto.

Ekzemploj : se vi skribas nepersone al ĵurnalo, al la
7 justico; se vi telefonas al la policejo, al fajrobrigado, ktp,
tiuj moralaj personoj fariĝas viaj amaskomunikiloj.


---

* La alineoj estas numeritaj por faciligi la transporton de viaj rimarkoj

8 La peranto aŭ/kaj la amaskomunikilo deklaras la mediacian KOMUNIKON atendatan de la petanto.

9 Por eviti ripetojn, la precizaj difinoj de ĉiu el la protagonistoj kaj de la rezulto de ties rilatoj estas donitaj ĉi-poste en la projekto de tiu kodo (vidi : B, ekde p.50)

10 Skemo :




## II. ANTAŬPAROLO PRI LA AMASKOMUNIKILOJ

11 Oni povis difini nian epokon kiel tiun, en kiu la informo ĉesas dependi de la evento : ĝi estigas ĝin, modlas ĝin, plilongigas ĝin aŭ kontraŭe ignoras aŭ sufokas ĝin. La daŭra aliro al vasta opinio permesas al amaskomunikiloj (precipe ĵurnaloj, radio, televido, gazetaro, kino; cirkuleroj de grupoj industriaj, financaj, sindikataj, ktp) kondiĉi nian sperton de la aĵoj kaj niajn reagojn al faktoj travivitaj ekstere de ĉiu persona kontakto kun ili.

12 Kiel la ĵurnalistoj ŝatas proklami tion, la amaskomunikiloj faras kaj malfaras la eventon.

13 Sen demandi al ni, ĉu la amaskomunikiloj prave fanfaronas pri tio - ĉar la produktoj de ilia "industrio" ne brilas kutime pro sia alta kvalito - ni povas tamen deziri ricevi de tiuj amaskomunikiloj, "perantoj", iom utilan produkton, kiu respondu al kondiĉoj de ekzakteco, de precizeco kaj de signifo, kiuj permesas integri ĝin legitime al nia perspektivo pri la mondo, la homoj kaj la aĵoj.

14 La profito de la petanto devas regi la kvaliton kaj la distribuon de la informo. La informita individuo rajtas postuli : unue, ke oni informu lin pri faktoj realaj, kontrolitaj, koncerne tiun aŭ alian aspekton de aĵoj proporcie kiel tiu aspekto rilatas kun liaj profitoj profesiaj, intelektaj, vitalaj. Due, la informita individuo rajtas komuniki sian taksadon, sian juĝon, la decidojn, kiujn li prenas, kaj la agojn, kiujn li entreprenas koncerne tian aŭ alian donitaĵon de la informo; li rajtas postuli de tiuj "perantoj"

ke ili ludu sian rolon propagante lian propran informon, laŭ iu aŭ alia maniero, en la ĉeno de komuniko tiel establita.

15 Unudirekta informado, kiu adresas fermitan mesaĝon, kies principoj kaj ligiloj elglitas el ĉiu analizo, el ĉiu ekzameno, el ĉiu korektado fare de la uzanto estas, en la strikta senco de la termino, informo nula. La elementa 'feed back'(1) postulata de rudimenta maŝino tute mankas al ĝi.

16 Tamen, ni havas la kutiman eksperimenton, ke tiuj du elementaj kondiĉoj de la informo :
- la individuo devas esti ĝuste informita,
- ĝia respondo devas esti publikigita,
kiuj reprezentas la profiton de la individuo, estas kutime kaj, ĝuste ŝajnas, sisteme malestimataj. Ĉiu povas konvinkiĝi pri tiu stata fakto per sia persona eksperimento.

17 Se multnombraj petantoj alvokas, apelacias la perantojn kaj amaskomunikilojn, estas tamen komune akceptite, ke ne la perantoj, ne la amaskomunikiloj estas larĝe respektataj, kiel ili devus normale esti. Tiu konstato estas imputebla al tiu fakto, ke multaj petitaj mediacioj ne respondas al la opinio, kiun oni kutime havas pri la justico, kio estas rapide kontentigi la bonan rajton. Unue, ĉar granda parto de petoj ne finatingas mediacian komunikon, ĉar ne ĉiuj perantoj kaj precipe amaskomunikiloj konscias pri sia devo, kiu estas enketi pri peto, tiel longe kiel necesas, por ke ĝi finatingu mediacian komunikon. Aŭ ili forlasas tutsimple peton, aŭ ili eldiras mediacian komunikon neadekvatan aŭ nekompletan aŭ neaplikeblan.

18 Rezultas foje kontraŭagoj, kiujn la pasivaj civitanoj ne komprenas kaj kiuj estas prezentitaj kiel revenĝoj, malesperaj aŭ eĉ teroraj, foje sangaj agoj.

19 Jen kelkaj pruveblaj ekzemploj.

## III. EKZEMPLOJ KIUJ PRUVAS NECESON KAJ URĜECON STARIGI KODON DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO

20 1. La prezidanto de deklarita asocio skribas al ministroj, prezidento, pri temo, kiu respondas al statuto de lia asocio. Li ne ricevas respondon, aŭ li ricevas pli aŭ

(1) = retroago = komando de sistemo per la reenkonduko en tiun de la rezultoj de ĝia ago.

malpli malfrue respondon, kiu estas aŭ simpla ricevavizo, aŭ prokrastiga respondo aŭ favora respondo, sed kiun ne sekvas la atendita rezulto.

21 2. Ĵurnalo publikigas artikolon de iu persono, ĵurnalisto aŭ simpla korespondanto, kiu anonime atakas asocion ĉe ĝia honoro. La prezidanto de la asocio ne povas obteni la publikigon de lia respondo en tiu ĵurnalo, ĉar la ĉefredaktoro eĉ ne respondas al li.

22 3. Ĵurnalo publikigas asertojn objektive mensogajn, kiuj koncernas tian aŭ alian problemon, ekzemple tiun pri la sistemaj radiologiaj ekzamenoj. La prezidanto de la asocio por protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj tiam skribas al tiu ĵurnalo kaj pruvas, ke tiuj asertoj estas mensogaj. La ĵurnalo ne publikigas tiun respondon, kio permesas supozi, ke ĝi tiel riskus malkontentigi la komercistojn de radiologiaj aparatoj kaj filmoj, kiuj aperigas reklamajn anoncojn en tiu ĵurnalo.

23 4. Multnombraj ĵurnaloj publikigas preskaŭ samtempe, anonime aŭ sub la nomo de ĵurnalisto, artikolon, kiu originas de gazetagentejo kaj kiu entenas neekzaktajn asertojn aŭ kiu donas nur la bonajn flankojn de malkovro, elpenso, tekniko (ekzemple, la bonefikojn de nukleaj centraloj). Tiu artikolo estas provizita senpage aŭ eĉ pagita al la agentejo fare de iu organismo, kies nomo ne estas indikita de la agentejo kaj ne reproduktita de ĵurnaloj. Individuo aŭ la prezidanto de asocio, se li respondas pri tiuj asertoj, objektive, ne vidos publikigita sian respondon. Oni respondas al li iafoje : "Vi ne povas pretendi pro "respondrajto" ĉar vi - aŭ via asocio - ne estas nome citita".

24 5. Aŭskultinto-spektinto skribas al TV-stacio por peti tekston aŭ videokasedon de elsendo pri kiu li deziras respondi. La stacio respondas al li, ke neniu kopio estas farita. Se tiu aŭskultinto-spektinto kopius permagnetoskope, oni eble respondus al li, ke tia kopio ne havus pruvan valoron ĉe tribunaloj.

25 6. Kuracisto skribas al vicministro de la ŝtata funkcio kaj de la administraj reformoj, iniciatinto de reformo favore al la ŝtatoficistoj konsiderataj kiel "ŝtatoficistoj-ŝtatanoj" (nova franca ĝenerala statuto de ŝtatoficistoj) por atentigi ilin, ke la ĵuro, kiu trudas la sekreton al

la ŝtatoficistoj de la "Centra Oficejo pri Protekto kontraŭ la Jonigantaj Radiadoj", eĉ post la ĉeso de iliaj funkcioj, estas kontraŭa al lia reformo. Sen respondi pri la fundo de la problemo levita de tiu kuracisto, problemo pri kiu ja kompetentas la ministro, ĉi-lasta respondas al la kuracisto, ke li transsendas lian leteron al alia ministro, - kiu 7 monatojn post la sendo de tiu letero ankoraŭ ne respondis al tiu kuracisto.

26 7. Laboristo estas infektita de plutonio kaj maldungita ĉar li rifuzas subiĝi al radiologia sistema ekzameno, kiu kreskigas la nocajn efikojn de tiu infekto. Sed tiu laboristo elmontras aliparte sen perforto religiajn opiniojn, kiuj perturbas la konformismon de la bonpensantoj. Por ne pliprofundigi la medicinan problemon starigitan de lia maldungo, la gazetaro indiferentas pri la personaj opinioj de tiu laboristo kaj rifuzas lian "respondrajton".

27 8. Universitata profesoro, krome prezidanto de grava asocio, skribas en aŭgusto de '83 al la franca Prezidento por admoni lin, ke li rezignu ekfunkciigi la supergeneratoron Super-Feniks, en Malvilo. Nenia respondo en la deka de decembro de 1983.

28 Ktp. La ekzemploj, kiujn vi povos doni, estos speciale bonvenaj. Por ilustri tiun rubrikon per freŝdataj ekzemploj, ĉu vi povus rememorigi petojn pri mediacio jam faritajn kaj lasitajn sen kontentigaj respondoj ? Estus dezirinde, eĉ se vi formulas anonime viajn ekzemplojn, kiel estas la ĉi-supraj ekzemploj, ke vi povu eventuale precizigi ilin poste (kopioj de adresitaj leteroj, de ricevitaj respondoj, ktp).

29 La informo, eĉ en la grandaj, industriaj, modernaj socioj daŭre estas regata de la principoj, kiuj regis la komunikon de la novaĵoj en la kortego de Aŭgusto kaj de Tibero : flataĉo, senkuraĝaj silentoj, kaj kabaloj.

30 Malmultaj homoj ekpensas miri :
- ke la plej masiva informado estas dissendita deire de politika instanco oficiala aŭ partia,
- deire de strukturo de ekonomiaj, privataj profitoj,
- ke propagando kaj reklamoj superregas plejofte la elekton kaj la diskonigon de la informoj.

31 La raportoj de sondadoj, kiuj ŝajnas doni al la publika

opinio la bildon de ĝiaj propraj reagoj, estas ekzemplo pri la manipulado de la opinio sub iu ŝajno de moderna demokratio. Ĉiu sondado, mendita kaj pagita de la komanditanto, estas evidente lia posedaĵo : la kontrakto pri sondado estas sekreta, la komanditanto diktas ĝiajn demandojn kaj trudas la lokojn, kie ĝi okazu, por ke la respondoj estu favoraj; la komanditanto rezervas al si la rajton modifi la respondojn aŭ ne publikigi ilin.

32 La sondadoj ne ekzistus, se ĉiuj amaskomunikiloj kaj perantoj plenumus sian devon pri komunikado. Ĵurnalisto iam diris, ke unu letero de leganto estas kalkulita kiel la opinio de milo da legantoj. Ĉar tiu letero ne estas publikigita, oni anstataŭigas ĝin per sondado kaj oni deklaras kun nekredebla aŭdaco, ke specimeno de milo da sonditaj personoj reprezentas la opinion de 50 milionoj da Francoj.

33 La popularec-noto de Prezidento interesas fakte nur la Prezidenton kaj la politikistojn avidajn preni lian lokon. La fakto scii, ĉu "x" elcentoj de Francoj estas por aŭ kontraŭ la disvolvigo de la nuklea energio, respondas la artifika demando, kiu donos neadekvatan respondon, ĉar la plimultego el la demanditaj personoj nescias la kaŭzojn kaj la rezultatojn pri tiu industrio. Male, ĉiuj estus forte interesataj, se iu kuracisto deklarus esti konstatinta la reintensiĝon de iu malsano imputebla al iu industrio aŭ instalejo nuklea, kiel la ĉeno "Jorkŝira Televido" anoncis freŝdate la pligrandigon de la nombro da leŭkemioj ĉe la infanoj loĝantaj proksime de la nuklea centralo de Vindskalo (en gazetaro, la 83.10.31).

34 La KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO, proponita al ĉies juĝo, ebligu al ŝtatanoj unue establi la konstaton pri la mankoj de la informo, poste deziri publikigi tiun konstaton, fine partopreni en la ago lanĉita de la UNIVERSALA GRUPO DE PERSONOJ KAJ ASOCIOJ AKTIVANTAJ POR STARIGI KODON DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO.

## IV. KONSTATOJ

35 1. La petanto : individuo aŭ reprezentanto de asocio povas esti ignorata de la perantoj aŭ amaskomunikiloj, kiel ajn konforma kaj objektiva estu ĝia peto.

36 2. Leĝoj, kiuj koncernas la komunikadon - kiam ili ekzistas - favoras la potenculojn je la malprofito de la malfortuloj. Ekzemple : potenculo povos publikigi artikolon aŭ serion de artikoloj dum malfortulo ne povos tion, pro sia malriĉeco aŭ/kaj ĉar ĝia malforto ne alarmas la amaskomunikilon. Ĵurnalo ĉiam publikigos la "respondrajton" de potenculo kaj povos memvole ignori tiun de malfortulo.

37 3. Nenia responddevigo estas leĝe starigita en Francio por la plimulto el perantoj kaj amaskomunikiloj, krom la periodaĵoj kun tiu limiga kondiĉo, ke la petanto (persono aŭ asocio) estu persone citita (par. 13a de la franca leĝo pri la gazetaro, en la 29a de julio 1881). Tiu limigo instigas evidente la ĵurnalojn publikigi kalumniojn : ilia procesoficejo indikas al ili, kie ili povas iri sur tiu vojo.

38 4. Nenia adekvateco de la mediacio estas trudita al la perantoj aŭ amaskomunikiloj. Se via advokato defendas vin tiel malbone, ke vi estas nejuste kondamnita, neniu persekutos vian advokaton pro malbona komunikado.

39 5. La tempo efikas kontraŭ la petantoj, profite al la perantoj kaj amaskomunikiloj. Malrapide juĝopovo malkuraĝigas la malfortulojn kaj favoras la potenculojn, kiuj scias atendi juĝon, favoran aŭ ne malfavoran al ili. Kaj eĉ tiu tempo povas esti misuze taksita kiam, ekzemple, la ĉefredaktoro de ĵurnalo respondas al vi, eĉ post mallongega tempo, ke via letero "cetere tre interesa, ne plu estas aktuala", eĉ se ĝi restas evidente tia. Ministro eluzos vian paciencon, ne respondante al via letero, aŭ respondante al vi malprecize, aŭ resendante vin al alia ministrejo. Koncerne la francan Ŝtatan Konsilion, ĝi atendigos dum jaroj la juĝon de peto al malestiminda malfortulo.

40 6. La profesio, la komisio aŭ la devo de mediacio estas iafoje fakte nur la ŝajno de tiu profesio, komisio aŭ devo. Kiu scias, ekzemple, ke elektito ne estas devigata plenumi la promesojn, kiujn li faris kiel kandidato al siaj elektontoj, eĉ se tiuj promesoj estas tuj realigeblaj ? Oni legos pri tiu temo kun granda profito : "Le peuple et son maître - Pour un coup d'état de l'individu" (La popolo kaj ĝia mastro - Por ŝtatrenverso

fare de la individuo), de J.F. Prévost (Plon, eldonisto en Parizo). Do li povas scie ne respondi al peto pri mediacio aŭ respondi al tiu prokraste aŭ neadekvate.

41 7. La rolo de la profesia peranto (leĝodona, administra, juĝa, ktp) estas fiksita surbaze de ĝia profesio; ĝia statuto - se ekzistas - devigu lin respondi al **ĉiuj** petoj prezentitaj de la petantoj, **rapide** kaj **adekvate**. En kiuj paragrafoj de la diversaj statutoj estas starigita tiu devigo ? Kontraŭe, iuj perantoj laŭ komisio aŭ devo ne komprenas la devigojn, kiuj rezultas de tiu komisio aŭ devo, kies unua estas ne malestimi la petanton; ekzemple : ĵurnalisto, kiu ne respondas al petanto, malestimas lin; se li ne povas aŭ ne volas respondi, tio estas, ĉar li ne aŭ ne plu meritas esti ĵurnalisto.

42 La amaskomunikiloj, laŭ mezuro kiel la petantoj aŭ perantoj alvokas ilin, same komprenu la devigojn, kiuj rezultas de ĝia ekzisto, kies unua estas egale ne malestimi la petantojn aŭ la perantojn.

## V. PRINCIPOJ, KIUJ KONCERNAS LA AMASKOMUNIKILOJN

43 1. La publiko, longe kondiĉita de la orientita informado de la amaskomunikiloj, ne postulas de ili tutan informadon, ĉar ĝi opinias, ke ĝi estus samtoje neebla kaj neutila por la amaskomunikiloj kaj por tiuj, kiuj utiligas aŭ suferas ilin. Fakte, ĉiu peranto, kiu uzas la amaskomunikilojn, ĉiu informanto, ĉiu grupo de informantoj, kiu konsistigas amaskomunikilon, ĉiu serio de informoj povas raporti nur tre limigitan ensemblon de faktoj, laŭ decidita perspektivo.

44 Ĉiu informo do devas esti akompanata de la preciza indiko pri ĝiaj fontoj : kiu informas ? kiam okazis la evento kaj la informo, kiu raportas ĝin ? Kie ? Kiuj personoj atestis pri ĝi ? Kiuj estis la limoj de la observo: kion oni elektis observi, kion oni elektis ne observi ?

45 2. Oni ne povas postuli de la informantoj subliman indiferentecon pri la donitaĵoj, kiujn ili komunikas : estetikaj gustoj, moralaj aŭ/kaj politikaj elektoj, karaktero kaj eĉ humoro apartenas al la kapabloj de ĉiu informanto **Sed li povas nek ignori tiujn aferojn nek lasi ignori ilin.**

46 Tiel ĉiu informanto devus mencii, komence de sia

raporto : sian identecon, siajn politikajn apartenon aŭ preferojn, sian sindikatan formiĝon, siajn diversajn titolojn kaj, kial ne, sian humoron, ne depende de la okazaĵoj, kiujn li raportas, kiel malpasiema kaj neutila deco rekomendas ofte al li fari tion (kiom oni suferas pro tiu deca patoso kaj funebra ĝentileco, kiuj akompanas la sangajn abomenaĵojn, kiujn oni prezentas al ni!).

47 Estus rekomendite al li precizigi la staton de hasto aŭ de sekureco, de maltrankvilo aŭ de persona certiĝo, en kiu li realigas, tie kaj tiam, la operaciojn de sia profesio. Okaze, se estus rekonite, ke liaj deklaroj estas falsaj, li estus punebla ĉe la juĝopovo.

48 3. Ĉiu rimedo de informo skribita, parolita, perbilda, devas esti prezentita rezervante lokon aŭ tempon por la libera interveno de **ajna persono** ricevinta la informon.

49 4. Se la publiko ne postulas de la amaskomunikiloj tutan informon, li devus almenaŭ postuli **esencan informon,** tio estas tiu, kiu donas, resumas, rememorigas la esencajn novaĵojn en la mondo kaj en la regno, kaj tiuj esencaj novaĵoj laŭ la estonteco povas ne prezenti spektaklan aŭ skandalan karakteron.

50 Freŝdata novaĵo ilustras la gravecon de la esenca karaktero de iuj informoj : profesoro Sune BERGSTRÖM, Nobel-premio de medicino en 1982, prezidis "Internacian komitaton de ekspertoj en medicinaj sciencoj kaj publika sano". Inter aliaj ciferoj, tiu komitato deklaris, ke la nukleaj bomboj povas atingi iun ajn punkton sur la terglobo kaj, ke "tuta milito", kiu uzus nur la duonon de la nukleaj armiloj farus pli ol 1 miliardon da mortintoj kaj pli ol 1 miliardon da vunditoj. Kio subkomprenas, ke se oni uzas la tuton de la nukleaj armiloj, oni mortigos aŭ vundos la 9/10-onojn de la homaro. **Jen esenca novaĵo** : kiom da ĵurnaloj skribitaj, parolitaj, televiditaj raportis ĝin ? Kiom da utiligis tiun esencan novaĵon por diskonigi enketojn, demandi klerulojn, ŝtatestrojn ? Kion ni povas opinii pri la rolo de komunikado plenumita tiuteme de la amaskomunikiloj ?

51 Laŭ difino, regno submetita al diktatoreco suferas la cenzuron de la informoj, kaj la regatoj de tiu regno - se ili petas komunikadon - faras tion riske de sia persona

libereco. Kontraŭe, en liberala regno, ŝtatano povas peti komunikadon kaj ricevi de la amaskomunikiloj almenaŭ la esencajn informojn, **kondiĉe, ke ili malsekretigu ilin.**

52 Oni povas rekoni, ĉu liberala regno estas demokratia, kiam ĉiuj esencaj informoj estas donataj kaj kiam ĝia esenca karaktero estas eksplikata, rememorigata tiel longtempe kiel necese. Se esenca informo kun internacia karaktero estas donita en iu lando, cenzurita en alia, la unua regno estas demokratia, ne la dua; la unua permesos la komunikadojn, ne la dua.

53 Nu, ĉiuj registaroj, dank'al siaj multnombraj informoficejoj, scias ekstrakti horon post horo la esencajn informojn inter ĉiuj, kiujn kolektas tiuj oficejoj. Kaj ĉar ili disponas pri trudrimedoj al la mastroj de la amaskomunikiloj, oni povas diri, ke regno estas demokratia, se ĝiaj amaskomunikiloj diskonigas ĉiujn esencajn informojn tiel longe kiel ĉi-lastaj konservas tiun esencan karakteron.

54 5. Kontrolo de la mediaciaj reguloj devus esti starigita. Ĝi povus dependi de Supera Aŭtoritato de la Mediacio, sendependa de la povoj, konsistanta el konstantaj aŭ okazaj specialistoj sendependaj de la povoj, kaj de juĝantaro lotita kaj renovigebla ĉiusemajne. Oni statistike antaŭzorgu, ke konsisto de tiu juĝantaro estu plejeble heterogena koncerne la homajn, sociajn, intelektajn kaj kulturajn kvalitojn de la individuoj konsistigantaj tiun Superan Aŭtoritaton de la Mediacio.

## B. PROJEKTO PRI KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO

55 **Paragrafo 1a.** En la dato de ......... estas starigita KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO, kiu fiksas la rajtojn de la petantoj kaj la devojn de la perantoj kaj amaskomunikiloj.

56 **Par. 2a.** En la nuna kodo, oni nomas :

57 2.1. **Petanto**, ĉiun fizikan aŭ moralan personon, kiu petas skribe aŭ parole la helpon de peranto aŭ/kaj de amaskomunikilo;

58 2.2. **Peranto**, ĉiun fizikan aŭ moralan personon, kies

profesio, komisio aŭ devo celas intervenon demande de petantoj kaj favore al ili;

59 **Ĵurnalisto**, peranton, kiu skribas en periodaĵo, parolas en radiostacio aŭ per bildoj, produktas fotografaĵojn, mapojn, desegnojn, grafikaĵojn, skemojn, uzatajn de la gazetaro skribita, parolita aŭ televidita, ĉu li estas profesia ĵurnalisto, specialisto salajrata aŭ ne, daŭra aŭ okaza aŭ simpla okaza korespondanto;

60 2.3. **Amaskomunikilo**, publikan kaj kolektivan rimedon de komuniko inter fizikaj aŭ moralaj personoj, petantoj aŭ perantoj;

61 2.4. **Mediacio**, la rezulton de la peto farita de petanto ĉe peranto (kiu utiligas eventuale la helpon de amaskomunikilo) aŭ de amaskomunikilo (kiu utiligas eventuale la helpon de peranto).

62 **Par. 3a.** Ĉiu petanto povas pretendi pro paragrafo de tiu kodo tuj post ĝia aperado. La ne-apero de dekretoj kaj aŭ de aplikcirkuleroj ne povas esti kontraŭstarigita al li. Sankcio : ....

63 **Par. 4a.** Nenia limtempo de forkludo povas esti kontraŭstarigita al petanto, kiu pretendas pro unu el la paragrafoj de tiu kodo. Sankcio : ......

64 **Par. 5a.** La esenca devo de perantoj kaj amaskomunikiloj estas kompreni kaj plene praktiki sian profesion, komision aŭ devon enketi pri la petoj, kiuj estas prezentitaj al ili skribe aŭ parole.

65 **Par. 6a.** Ĉiu petanto povas procesi kontraŭ peranto aŭ amaskomunikilo kiu, laŭ li, evidente malbone defendis lin.

66 **Par. 7a.** Ĉiu fizika persono povas procesi kontraŭ peranto aŭ amaskomunikilo, kiu atencis lian honoron, eĉ anonime.

67 Ĉiu morala persono povas procesi kontraŭ peranto aŭ amaskomunikilo, kiu atencis ĝian honoron aŭ tiun de samgrupano, eĉ anonime.

68 La koncerna peranto ne povos pretendi pro kia ajn funkcio, privilegio de kia ajn juĝpovo por forigi tiun plendon aŭ prokrasti ĝian proceduron. La koncerna amas-

komunikilo ne povos pretendi pro submetiĝo al povo por forigi tiun plendon aŭ prokrasti ĝian proceduron. Sankcioj : .....

69 **Par. 8a.** La funkcio de peranto trudas al li respondi senprokraste kaj adekvate al petanto aŭ indiki al li kial li ne povas kontentigi lian peton kaj al kiu(j) fizika(j) aŭ morala(j) persono(j) li sin turnu. Neniel peto restu sen valida respondo. Sankcio : .....

70 **Par. 9a.** La amaskomunikiloj devas respondi senprokraste kaj adekvate, uzante siajn komunikajn rimedojn, al ĉiuj petoj prezentitaj de petantoj aŭ perantoj, aŭ indiki al ili kial ili ne povas kontentigi iliajn petojn kaj al kiu(j) alia(j) amaskomunikilo(j) aŭ peranto(j) ili sin turnu. Neniuokaze ili povas lasi peton sen valida respondo Sankcio : .....

71 **Par. 10a.** La tribunaloj alvokitaj de petantoj aŭ de perantoj malkontentaj pri mediacioj eldiritaj aŭ tro longe atenditaj devas tuj juĝi tiujn postulojn. Se limtempo estas necesa por ekzameni postulon kaj verdikti, provizora juĝo estos eldirita, tiam favore al petanto.

72 **Par. 11a.** Ĉiuj publikaj aŭ duonpublikaj organismoj devas tuj atesti ricevon de ĉiuj leteroj, telegramoj, telefonvokoj, ktp, kiujn ili ricevas de petantoj. Tiu ricevavizo devas permesi al ĉiu petanto sekvi la iradon de sia peto. Se la ricevavizo malfruas, la tribunalo alvokita de la petanto devos trudi al la persekutita instanco imperativan limtempon por adekvata respondo. Sankcio :.....

73 **Par. 12a.** Ĉiuj artikoloj, fotografaĵoj, mapoj, desegnoj, grafikaĵoj, skemoj, kiuj aperas aŭ estas raportitaj sur la komunikilo skribita, parolata, televidita, devas esti subskribitaj tiamaniere, ke la subskribinto, eĉ se li subskribas per pruntnomo, povu esti eventuale identigita de la justico. Sankcio : .....

74 Se ili originas de agentejo por artikoloj pri ĝeneralaj aŭ specialigitaj informoj, por raportaĵoj, desegnoj, fotografaĵoj, filmoj, ktp, ili devas indiki la nomon de la koncerna agentejo kaj tiun de la persono aŭ de la organizo, kiu provizis ilin al la agentejo, por ke tiu ĉi diskonigu ilin. Sankcio : .....

75 **Par. 13a.** Ĉiun informon akompanu la preciza indiko

pri ĝiaj fontoj : Kiu informas ? Kiam okazis la evento ? Kie ? Kiuj personoj atestis pri tiu ? Kiuj estis la limoj de la observo : kion oni elektis observi kaj kion elektis ne observi ? Sankcio : .....

76 **Par. 14a.** Por ĉiu informo, kiu koncernas la personojn, la ĵurnalistoj devas konigi siajn politikajn, moralajn, sindikatajn, ktp, personajn emojn kaj elektojn, eĉ se ili certigas praktiki objektive sian profesion. Sankcio :....

77 **Par. 15a.** Ĵurnalisto, kiu demandas personon, devas registri sian enketon per du magnetofonoj aŭ/kaj kameraoj, kaj doni al la demandita persono unu el la kasedoj aŭ/kaj filmoj, kiuj konstatas tiun enketon. Tiuj kasedoj kaj filmoj estos datitaj kaj subskribitaj de la ĵurnalisto kaj de la demandita persono. Sankcio : .....

78 **Par. 16a.** Radio- kaj televido-stacioj devas publikigi oficialan ĵurnalon (eventuale komunan), kiu enhavas la tutan reprodukton de paroloj, tekstoj presitaj sur la ekranoj, fotografaĵoj, mapoj, grafikaĵoj, kun la datoj kaj horoj (eventuale la minutoj) de ties aperigoj. Sankcio : .....

79 **Par. 17a.** La ĵurnalistoj de televido devas indiki la komencan fonton de ĉiu el la informoj, kiujn ili raportas : personon aŭ/kaj organizon aŭ/kaj agentejon. Ili rifuzu raporti informon de agentejo, se tiu ĉi ne indikas sian komencan informanton. Sankcio : .....

80 **Par. 18a.** Televido-stacioj devas konservi ĉiujn bildojn kiujn ili produktas, transdoni unu kopion al Nacia Biblioteko, al Arkivoj de sia departemento (aŭ teritoria unuo), al Arkivoj de la justicministrejo kaj, laŭ justica postulo, vidigi al la koncernaj telespektantoj la fragmentojn, kiujn ĉi-lastaj kontestas. Sankcio : .....

81 **Par. 19a.** Ĉiuj filmoj, kion ajn ili celas (paganta publiko, lernejoj, propagandfilmoj industriaj aŭ aliaj, ktp) devas kunporti la nomo(j)n de la komanditanto(j) kaj produktisto(j). Kompleta kopio devas esti transdonita al la Nacia Biblioteko, kiu plenumos ĝian kompletan konservadon. Sankcio : .....

82 **Par. 20a.** Ĉiuj reklamdokumentoj skribitaj, parolitaj, viditaj, devas esti tuj deponitaj ĉe la oficialaj instancoj

de konservado de tiuj dokumentoj, por ke ĉiuj petantoj povu eventuale denunci iliajn mensogojn (*).

83 **Par. 21a.** Ĉiu rimedo pri informo skribita, parolita, per bildoj, devas kunporti lokon aŭ tempon por la libera interveno de iu ajn persono, kiu ricevis la informon. Tiu loko aŭ tempo povas ne sekvi tuj la koncernan informon. Tiu respondeblo devas esti rememorigita en la periodaĵoj kaj komence de ĉiu elsendo pri parolataj aŭ televidataj informoj. Sankcio : .....

84 **Par. 22a.** Ĉiu sondado de la publika opinio devas indiki :

- la fizikan aŭ moralan personon, kiu mendis la sondadon,
- la celon de tiu sondado,
- la elektitajn demandojn, kaj de kiu (la komanditanto aŭ/kaj la instituto pri sondadoj),
- la socian medion, kie okazis la sondado,
- la nombron da demanditaj personoj kaj la procenton, kiun tiu nombro reprezentas rilate al la tuta nombro de personoj, kiuj partoprenas en la konsiderita medio,
- en kiu meza tempo ĉiu demandita persono respondis al la tuto de la faritaj demandoj,
- ke la kompleta protokolo pri la sondado estis deponita antaŭ la sondado en la Nacia Biblioteko, en Arkivoj de la justicministrejo kaj en la Supera Aŭtoritato de la Mediacio proponita en la sekvanta paragrafo.

85 **Par. 23a.** Supera Aŭtoritato de la Mediacio zorgas, ke la komunikado inter petantoj, perantoj kaj amaskomunikiloj estu facila, komprenebla, rapida kaj, ke la petita mediacio estu adekvata. Ĝia kompetenteco, morala, ne anstataŭas tiun de la tribunaloj, sed ĝi permesas limigi la liberan apelacion al ili.

## C. ASOCIO

86 Por realigi la celojn ĉi-supre prezentitajn, ŝajnas utile krei universalan asocion, por ke la anoj de ĝiaj naciaj, lokaj, kategoriaj sekcioj povu pretendi pro la komunikaj garantioj, kiuj ekzistas en aliaj regnoj.

Alvoko diskonigita en la 83.09.19 La............
Ĝisdatigo n° 4 : 84.01.25 Por la GRUPO aŭ unu el ĝiaj sekcioj :

(1) Tiun proponon faris D-ro O. Roujansky en sia bulteno : "Contre-Publicité, contre-pub" (Kontraŭ-Reklamo, kontraŭ-Rek'o) de la 83.11.20.

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut